



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Aprilo – Majo - Junio 2012-a


6a jarkolekto nro 80-82

Enhavo

Malnovaj hungaraj nomoj de la monatoj	3
Operludoj en Miskolc.....	3
Jardatrevenoj.....	10
Janus Pannonius: Pro pace – Békéért	10
Sporto	12
Ni funebras.....	12
Ĉinaj proverboj.....	17
Instruo – ekzameno	17
La Lingvoj Beaŝ-aj en Hungario.....	17
Promeno en Hatvan.....	25
Ĝustigo de ŝerco.....	27
Ne ŝerco estas	27
Leterkesto.....	27
Gratulo	30
HEA kunvenis bonetose	31
Gravaj Tagoj en Hungarujo.....	31
Gratulo	33
Legendoj de Miŝkolco	33
Legendo pri la trafiklampro	33
Ŝercoj.....	36
Noto pri la nova albana romano en Esperanto.....	40
IKUE en Pécs.....	40
En urbo Szeged okazos	40

Malnovaj hungaraj nomoj de la monatoj

Aprilo estas: monato de la ventoj. Vere nia aprilo konsistis multegan ventan malvarman tagon kvankam sunradian, kaj nur lastasemajne pluvis post la longdaŭra sekeco.



Majo en la Popolĝardeno de Miskolc

Majo estas monato de Pentekosto, monato de ĉiu promeso.

Junio estas monato de Suno-dio.



Enirejo de Kalvinana preĝejo en urbo Edelény

Karlo Sziklavári Operludoj en Miskolc

- La eson esperantigis László Pásztor -

-Daŭrigo -

VII.

„Opero-aferoj” de Miskolc: planoj kaj eksperimentoj de la dua duono de la 1950-aj, ĝis komenco de la 1980-aj jaroj

La urba estraro denove pruvis dum la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj, ke ne pretendas la ludon de operoj, spite de la promesoj kaj valida decido de 1962. Kontraŭe de tiu ĉi denove tagorda demando estis afero de la opero-grupo, urba simfonia orkestro. Afero de la opero-grupo kaj fondo de urba simfonia orkestro estis tagorda afero en laboro de la oficialaj forumoj. Somere de 1956 malcentrigo de la kulturo faris neatenditan situacion en regiono – pli bonaj eblecoj aperis, ol pli frue - pro tio la urba estraro decidis por fondi unu memstaran koncert-orkestron. Oni promesis, ke komence de januaro solviĝos problemo de opersekcio kaj nombrojn de la muzikistoj levos, kiel estis antaŭ la raciigo. Oni ankaŭ tion decidis, ke „en Miskolc estigas Filharmonian Societon, kiu patronas la novan orkestron kaj rigardas kiel tasko ankaŭ prosperigon de la muzika kulturo”. – komunikis gazeto „Nordhungario” la 26-an de julio de 1956. (laŭ kunveno de Miskolc, kiun partoprenis reprezentantoj de Ministerioj pri Kulturo, kaj Financo, departementaj kaj urbaj organizaĵoj kaj ceteraj muzikaj institutoj.) Samtempe vigla

disputo okazis pri tio: ĉu estu memstara la estonta orkestro, aŭ plie la kvindek persona orkestro havu la taskon de certigado de la koncerto? La antaŭa vidpunkto venkis.

Post ses jaroj dum kunveno de plenum-komitato de la urba konsilantaro oni konsideris muzikan vivon de Miskolc por solvi la plej gravajn demandojn. Oni klopodis ĉesigi tiun neteneblan staton, laŭ kiu Miskolc, rezidejo de la departemento ne havas profesionan orkestron. Oni decidis kiel celo por estigi memstaran orkestron (**ĝisduone dependigitan orkestron, kiu estus sekvanto de la Filharmonia Orkestro „Ferenc Liszt”**.) tiel, ke la direktojn de la filharmonia orkestro kaj teatro faru unu taŭga direktoro pri muziko. Sendependigo de la filharmonia orkestro kunligebla estas kun reestigo de la opero-sekcio. Konkreta decido naskiĝis por reorganizi la oper-grupon de la Nacia Teatro de Miskolc. (**Vidu pri ĉiuj ĉi: Nordhungario – 22. julio 1962.**) Pri la realigon celantaj daŭraj pritraktadoj samtempe oni povas legi en la menciitaj artikoloj: laŭ tiu „ĉiuj esperoj ĉeestas, ke la teatro la 1963/64. sezonon povas komenci kun pligrandiĝinta oper-sekcio”. – sed ĉi tiuj estis nur agrablaj vortoj. La Simfonia Orkestro de Miskolc feliĉe povis estiĝi en 1963., sed ĝis reekirigo de propra operludo de la teatro ankoraŭ pasigis kvaron-jarcento.

Kvankam la plej famaj muzikistoj faris penadojn por prosperigi la aferon de la opero. Petro Mura multfoje enprogramigis de koncertoj al koncertoj samajn operludojn dum jardekoj. Li estis ĉefdirigento de la Simfonia Orkestro de Miskolc. Laŭ lia plano en la operludon li volis engaĝi la Simfonian Orkestron, - la modelo de Debrecen. (**Vidu liajn skribaĵojn en 1956; en la oktobra numero de „Niaj tagoj” en 1977.**) Sed en 1980. Georgo Selmeczi iĝis estro de muzika vivo de la teatro, kiu celis por evoluigi la orkestron por esti kapabla operon ludi kaj koncerto-kapabla laŭ orientgermana ekzerco. Selmeczi devintus ekirigi denove la operludadon en la Nacia Teatro de Miskolc: tiam, kiam la urba konsilantaro ne provis validigi propran rezolucion kaj por ĝi kaj estroj de la teatro ne estis grava kaj aktuala la operludado. (**Vidu intervjuon kun Georgo Selmeczi [ŝelmeci] en la novembra numero de „Niaj tagoj” de 1980.**) Pro tio ĉi, la operludo okazis ekster la teatro, farante oni multe da someraj teatraĵoj. (**Pli malfrue pritemos pri ĝi pli detale.**)

Estas fakto, ke meze de la 1960-aj jaroj okazinta unuigo de teatroj de Miskolc kaj Eger pro politika koncepto donis superflujajn burokratajn taskojn al estro de Miskolc. Tiu unuigo ne helpis revivigi operludon de departemento Borŝod. Sed tiun la unuigo helpis, ke tamen estintus bona fari farendojn por la kultura vivo de la urbo. (La urbaj estroj estis seninteresaj, kio videblas en artikolo de „Nord-Hungario” – 8. januaro. 1978; ĉiuj bonaj intencoj malvenkas pro la senintereso.) Ĉi tion pruvas unu ne tro malproksima modelo. Foliumante tiun verkon, kiu pritemas pri historio de aktorado de Debrecen kaj verkinta meze de la 1970-aj jaroj, ni povas legi la subajn pri dudek jaroj de la lokaj oper-sekcioj: „ La opero de Debrecen dum kelkaj jaroj iĝis forta sekcio de la teatro kaj meritis rekonon de la publiko kaj la teatra fako. Ĝi pliriĉigis la spiritan kulturon de la urbo.” (**„Historio de aktorado de Debrecen”, redaktis Francisko Katona, Debrecen, 1976. 188. paĝo.**) En la 1950-aj jaroj bonŝancoj de ambaŭ urboj estis samaj - aldonante, ke radikoj de operludo de Miskolc estis pli longaj. Estus bona por legi samajn en la volumo aperinta dum jubileo de Nacia Teatro de Miskolc en 1973!

VIII.

Opervivo de tri jardekoj en Miskolc post la jaro 1957a

Dum kelkaj jardekoj la teatro de urbo Debrecen havis la taskon por aranĝi opero teatraĵojn en Norda,-kaj Orienta Hungario, - inkluzive ankaŭ en Miŝkolco, kie ne estis jam teatran ensemblon pri muzikaj teatraĵoj. Arton ŝatanta spektantaro de nia urbo (ne tenanta grava la provizorajn paŭzojn) se ankaŭ ne tro ofte kaj maldeterminita la oftecon al pretendoj de 200 miloj da loĝantoj, sed tamen ankaŭ plurfoje havis eblon viziti teatrajn prezentojn de la vojaĝanta opera-trupo de urbo Debrecen jam ekde fino de la 1950-aj jaroj. Ĉi tiuj teatraĵoj okazis pluraj okazejoj. Ekzemple: sur la Subĉiela Scenejo de Popolĝardeno estis prezentita:

„Marta” de Flotow en junio de 1988; en la Ferfabriko oni prezentis la operon: „Rigoletto” – aŭtune de 1959; poste de decembro de la jaro denove en la konstruaĵo de la teatro oni aranĝis ses operajn vesperojn dum la 1959/1960-a sezono („Maskobalo”, „Fidelio”, „Sorĉa fluto”, kaj „Baŭno Bánk”). Ankaŭ pli malfrue ludis operon la aktoroj de Debrecen ekster la teatro; en la Kulturdomo „Béla Bartók” (en 1974), en la „Vasas”(ferfabrika) Kulturcentro (ekde 1980) kaj ĉiusomere multfoje en la fortikaĵo de Diósgyőr dum la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj.

La ĉefe stagnantan kaj al eksteraj fortoj apogiĝantan opero-vivon de Miskolc ankaŭ aliaj gasto-ludoj kolorigis dum vico de la jardekoj: ĉefe la gasto-ludoj de aktoroj de urbo Košice („Nabucco”: 1964; *Traviata*:1974; „Rusalka”:1975; *Simone Boccanegra*:1977; „Honoro de kamparano” kaj „Bajazzo”: 1979; „Papilio fraŭlino”:1980; „Porgy kaj Bess”:1982, ktp.) aŭ ekz. gasto-ludo de la Ŝtata Opera grupo de Silezio per la koncerteske prezentita „Aida” (1974). La pli lasta estis parto de unu interesa eksperimento dum la 1973/74-a sezono: en lubileta serio (ĉefe por laboristoj) anoncitis, tri malsamaj ensembloj prezentis kversekcon de popularaj teatraĵoj en vesperoj de la Kulturdomo „Béla Bartók”: en februaro la trupo de Szeged prezentis la teatraĵon „Sorĉa fluto”, en marto la Debrecenvurba trupo la „Carmen”-on kaj en aprilo la poloj finis la serion.(Dum teatraĵ-prezentoj de oper-trupoj de Szeged kaj Silezio kunagis la Simfonia Orkestro de Miskolc, ĉe la pli lasta per direktado de la pola dirigento Napoleono Siess.) Kelkfoje ankaŭ en Diósgyőr faris viziton la vojaĝanta opera trupo de Popol-teatro de Budapeŝto en la 80-a jardeko: (La Popol-teatron oni estigis en 1978, unuigante la Ŝtatan Déryné Teatron kaj 25. Teatron, celante la teatron konvenan al la popola kulturo laŭ la ĉe-epokaj pretendoj kun popolklerigaj celoj. Ekde 1991. ĝi funkciis plu kiel Ĉambroteatro de Budapeŝto kaj ĝia opera grupo funkciis kiel Ĉambro-opero de Budapeŝto.) Oni prezentis operojn laŭ la programo en oktobro de 1982, poste en decembro de 1982 la „Johanon Hány” en la „Vasas” Kulturcentro; en marto de 1986 en la Kulturcentro „Endre Ady” junaĝan muzikan komedion de Rossini (*La cambiale di matrimonio*: „Interŝanĝitaj geamatoj); kaj en decembro de 1987 farsan operon de Donizetti oni prezentis la „Fraŭlino de la regimento”.

Krom la gasto-ludoj okazis plurloke teatraĵoj de la opera grupo de Miskolc, unufoje en la Muzikanta Korto, pli malfrue sur la Subĉiela Scenejo kaj en Görömböly kaj en Miskolc-Tapolca, kiuj kolorigis, vigligis la kulturan vivon de la urbo dum la varmaj someraj monatoj. (Cimarosa: „Sekreta gedzeco”-1981 kaj 1982; Mozart: „Don Giovanni” 1982,1983; Mozart: „Ŝajnigita naiveco:1984; Rossini: „Frizisto de Sevilla, 1986; pri ĉiuj ĉi pritemas pli detale pli malfrue.) En 1968 malfermiĝis la fortikaĵo de Diósgyőr, kiu estis inspira loko, kie plurfoje okazis someraj operaj-teatraĵoj. Tuj okaze de transdono de la fortikaĵo al la publiko, la 20-an de aŭgusto de 1968, poste dum julio de 1970 oni prezentis la teatraĵon ”Fortikaĵo de la blu-barba princo” (pri la teatraĵo pli malfrue pritemos.). Pluaj prezentoj parte, aŭ tute loke iniciatitaj teatraĵoj estis luditaj en la fortikaĵo: Britten: „Barko de Noa”,1979; „Nabucco, 1993; „Rigoletto” kaj *Così fan tutte*”:1994; „Don Giovanni”, 2000; „Trobadoro, 2002; Kelkaj gasto-ludoj de la opera-ensemblo de teatro „Csokonai” de Debrecen en la fortikaĵo: „Nabucco”, 1974; „Trobadoro”, 1979; „Fortikaĵo de la blu-barba princo, ”1980; „László Hunyadi” 1983.

Enteatron - memstaran - iniciaton signifis la duobla prezento de la opero-studio estigita je propono de dirigento Petro Kalmár en la Ĉambra Teatro, je la 5-a de junio de 1960.

Eksonis infanaĝa opero de Mozart, kiel prezento simila al koncerto; la „Bastien kaj Bastienne”, kion sekvis la "pasticcio"-farsa opero (postmoderna opero kun varia miksaĵo, imito de verkoj de la originala aŭtoro): la „Reĝino de majo”, (kompilita inter aliaj el verkoj de Gluck) kun dekoracio kaj masko-kostumoj. Tiu ĉi eksperimento ŝajne ne emociis la koncernulojn rilate la kompatindan staton de la operludado en Miskolc, kaj bedaŭrinde la teatro eventuale nur toleris ĝin.

Pli gravaj okazintaĵoj estiĝis en kultura vivo de la urbo la (ĉefe koncerteskaj) opero-prezentoj realiĝintaj per kunagado de la Simfonia Orkestro de Miskolc, komenciĝante jam de fino de la 1960-aj jaroj. Estu ĉi tie mallonga denombro sen pretendo de la tuteco! (Escepte

unu fojon, la dirigento Petro Mura rolis ĉiam.) La 27-an de majo de 1968 la kversekon de la Trobadoro eksonigis la orkestro en la teatro kun partopreno de operdomaj kantistoj kaj kantoĥoro de „Vasas” [vaŝaŝ=ferfabrika] Kulturcentro. La 2-an de junio en 1969 okazis laŭvice en la teatro la koncerteska prezento de opero „*Fortikaĵo de la blu-barba princo*” (la simfonian orkestron ĉi-foje direktis Ervin Lukács.) La opero „*Fortikaĵo de la blu-barba princo*” (mi jam menciis) eksonis per kunlaboro de la orkestro ankaŭ en fortikaĵo de Diósgyőr dum someroj de 1968. kaj 1970. **(Tiun ĉi operon oni prezentis ankaŭ en groto de Aggtelek la 14-an de julio en 1968.)**

La 28-an de aprilo de 1978, al „scenirozita” opera-ludo (dekoraciita operludo por plifortigi la psikologian efikon) donis hejmon la nova konstruaĵo de „Vasas” Kulturcentro inaŭgurita dum la pasinta aŭtuno, kiam la teatraĵo „*Don Pasquale* estiĝis scenigita kion reĝisoris Andreo Weszprémi, en interpretoj de invititaj solistoj (inter aliaj opero-fakaj gestudentoj), kaj la Simfonia Orkestro de Miskolc. „Inter la ĝisduone lokaj opero-prezentaĵoj ni povas enlistigi la prezenton de la 13-a de decembro de 1982 de opero „*Trobadoro*” en teatrejo de la „Vasas” [vaŝaŝ= ferfabrika] Kulturcentro, kiun partoprenis polaj kantistoj, la Simfonia Orkestro de Miskolc kaj ĥorusoj de la Veturil-ripariga Uzino de la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj kaj „Vasas” Kulturcentro.

Ni tute ne kapablas prezenti la modernan Miŝkolcan operludadon, se ni ne mencias la memstarajn provojn de la muzikon instruantaj institutoj de la urbo. Kadre de la „Oratorio-vespero” eksonis „*Dido kaj Aeneas*” de Purcell: direktinta de dirigento Johano Reményi, en ĉambrego „Bartók” de la Muzikarta Faka-Mezlernejo, en marto de 1968, laŭ datumoj de la programo. La operludado de la muzika lernejo „Béni Egressy” kunligiĝante kun nomo de Elizabeta Szőnyi rerigardas kvindek jaran pasinton. Ne longe post la ĉefurba debuto, ankaŭ en Miskolc eksonis la unua hungara infana-opero, la „*Obstinema reĝidino*” en majo de 1956. Ĝian ĉambra-teatran prezenton pli ol cent bazlernejoj partoprenis kaj post unu jaro oni renovigis la prezenton samloke: la pli lasta okazo estis en la plej kriza periodo de historio de la Nacia Teatro de Miskolc, kaj bonefik-cele ĝi estus destinata antaŭenigi ĵus la konstrulaborojn. **(Laŭ la ĝis nun trovitaj teatraj afiŝoj - 1957. jaraĵ - ankaŭ la infano Petro Eötvös estis membro de la rolantaro, kiel „tamburisto”. La teatraĵ-prezentoj okazis la 19-an, la 26-an kaj 27-an.)** En marto de 1977 kiel *premiero* eksonis en Miskolc la pli nova infanopero „*La orflugila abeleto*” de Elizabeta Szőnyi, dum la kvaron-jarcenta jubileo de la „Béni Egressy” Muziklernejo, per interpreto de gelernantoj de la instituto. Dek jarojn pli poste, en la unua publika eksonigo de fabel-opero de la komponistino (*La verdira ŝafisto*: en la ĉambrego-Bartók, la 5-an de majo en 1987), kunlaboris ankaŭ la gelernantoj Muzikartaj-fakmezlernejaj, kaj Muzikartaj-ĉeflernejaj, plie ankaŭ aliaj urbaj artistoj krom la gelernantoj de la muzik-lernejo. **(La okazon de premiero antaŭ la publiko, ankaŭ kaze de „*La orflugila abeleto*” kaj „*La verdira ŝafisto*” antaŭis la eksonoj de operoj en elsendo de la Hungara Radio. (Komuniko de Elizabeta Szőnyi.)**

Denove plendante pri manko de la loka operludo, multe da homoj eldiris ilian esperon ĉe prezento de la „Ver-diranta ŝafisto”, ke la publika prezentaĵo povos signifi la komencan ŝtupon de kreo de iama estonta muzika trupo en Miskolc. Same, kiel la ĉi-temaj imagoj ekde tri jardekoj, ankaŭ tiu ĉi certiĝis iluzio. Sed por la moderna urba, komplike vivanta homo malsata pri kulturo, ankaŭ ĉi terene montriĝis ioma mildiga solvo: (kvankam nur parte) kiel unu el la tre malmultaj pozitivaj naturaj benoj de la jarcento. Kiel medioj starigitaj por servi la amaskomunikilojn, apud la radio disaŭdigita la operoprezentojn jam ekde jardekoj, de la 1950-aj jaroj la kinoteatro, poste la televidilo kreis novecajn eblojn por la entuziasmoj pri operludoj tutlande al kontentigi iliajn pretendojn. **(Ĉar trolongiĝus mia raporto, mi ne faras menciojn pri la civiliziĝ-historiaj efikoj de CD, DVD kaj similaj eldonoj.)** La sorĉa influo de teknikaj atingiĝoj regantaj facile tiujn ĉi geografiajn landlimojn, ekvivigis ankaŭ pli modestajn formajn, sed de tio pli interesajn lokajn iniciatojn. El historia vidpunkto al la operkulturo de la urbo apartena fakto estas, ke de mikro-kanela gramofondisko en Miskolc jam okazis prezento de teatraĵoj dum la 1950aj jaroj. **(Ekzemple: al novembro - decembro de 1955 estis anoncita**

de la Metalurgia Kultur-hejmo: serion por kvar vesperoj, sub titolo de „Veturo en imperio de la Muziko”, en kies kadro eblis aŭskulti pri okcidentaj gramofondiskoj, ĉefe popularajn komponaĵojn de Verdi.) Komence de la 1970-aj jaroj la „Rónai Sándor” Departementa Kulturcentro komencis interesan eksperimenton: per la nomo AŬDIO-teatro de sonregistraĵoj ĝi prezentis ĝenerale ŝatatajn operojn en klubejo de la kulturdomo. (Pro la manko-havaj kaj unu al la alia kontraŭdirantaj dokumentoj la plena programo estas ne tute rekonstruebla. Ni scias pri la (probablaj) eksonoj de la sekvaj operoj inter 1970 - 1973 : *Baŭno Bánk, Carmen, Honoro de kamparano, Rigoletto, Papilio – fraŭlino, László Hunyadi, Don Carlos.*) Geaktoroj de Miskolc kunlaboris dum la teatraĵo-prezentoj, teksto-fragmentojn interpretante. Ekzemple, en kazo de la „Baŭno Bánk” detalojn de dramo de Jozefo Katona.

Pri kelkaj teatraĵo-prezentoj de oper-trupo de la 1950-aj jaroj (*Rigoletto, Forvendita fianĉino*) estis faritaj radio-registraĵoj je komenco de 1955, pli malfrue post kvaron-jarcento, la stabo de la Hungara Televido fiksas unu publikan prezentaĵon de aŭroro” de la moderna Miŝkolca operludo. La pli lasta estis la infan-opero „*Barko de Noa*”, de Britten, kiu kiel ranga, enlanda arta okazintaĵo de la Internacia Infanjaro estiĝis surscenigita dum tri vesperoj en la Fortikaĵo de Diósgyőr en aŭgusto de 1979. (La Televido registris ĝin dum la lasta tago de aŭgusto.) Eksterordinara okazintaĵo estis kio dankeblis ne pro la okazejo kaj ne pro la neparigebla fakto, laŭ kio samtempe estis Hungarlanda premiero kaj jam de jardekoj la unua, (preskaŭ) memstara, kompleta Miŝkolca opero-prezento, sed ĉar pro ĝiaj dimensioj (kune kun ĝiaj akcesoraj programoj) preskaŭ la duonan urbon ĝi ekmovigis. „Infanfesto estas en la fortikaĵo de Diósgyőr” – ni povas legi sur lasiatempa reklamfolio: „De tagmezo ĝis vespero daŭras la foiro la 14-an, 15-an, 16-an en aŭgusto. Estos fabeldiro kajto-flugigo, plekto de korbo, kakofonio, mielkuko! Ni kune desegnos, modlos, pupludos, kantos kaj fine ni konstruos barkon de Noa! Ĉiuvespere estos prezentata la infanopero „*Barko de Noa*” de Britten.” Ankaŭ ceteraj vidindaĵoj aliĝis al la ĉefa okulfrapa publika evento, en kies aranĝo partoprenis ĉirkaŭ tricent personoj. (De bastiono ĝis bastiono atingis la barko diagonale tra tranĉita la korton de la fortikaĵo.) Apud la solkantistoj rolantoj estis la gelernantoj de sep bazlernejoj de Miskolc, gelernantoj de la Muziklernejo „Béni Egressy”, gelernantoj de la 6. numera (Muzika) Baz-lernejo de Miskolc, gelernantoj de la Muzikarta Fak-mezlernejo de Miskolc. Kompreneble kunlaboris ankaŭ la Simfonia Orkestro kaj membroj de la Nova Muzika Metiejo de Miskolc. Georgo Selmeczi [ŝelmeci] havis la plej gravan meriton pro la aranĝo de la publika prezentaĵo, ja li tradukis la operon, organizis, reĝisoros kaj direktis la prezenton. (Selmeczi la komponisto, dirigento pianludisto de 1976 vivas en Miskolc kaj prosperigis muzikvivaĵon de Miskolc dum la jardekoj: li estigis la Novan Muzikan Metiejon de Miskolc, kiel ties estro. Dum la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj li organizis, direktis multe da someraj operoj.) La teatraĵon „*Barko de Noa*” la kritiko taksis kiel plej brilan someran laborprodukton de la sezono, aldonante: Selmeczi kaj membroj de Societo de Junaj Artistoj de departemento Borŝod „novajn eblecojn montris, kaj montris tiun vojon, kiu povas esti sekvenda en la somera muzika vivo de Miskolc.” (Tagjurnalo Nordhungario – 29. aŭg. 1979.)

Ĉi tiu profetaĵo fundamente montriĝis vera rigardante la unuan duonon-mezon de la 1980-aj jaroj: ekde la sezono 1980/1981-a Georgo Selmeczi estante muzika estro de la teatro kaj havante multe pli bonajn eblojn ol pli frue, klopodis deturni en pozitivan direkton „aferon de opero” de Miskolc - sed ĉar ene de la instituto ne eblis ludi operon, anstataŭ ĝi li igis regulaj la somerajn publikajn prezentaĵojn inter la jaroj 1981 kaj 1984. (Ankaŭ post lia disiĝo de la teatro, dum kelkaj jaroj.) Kun eksterordinara entrepren-emo benite, – komence li trovis ambician partneron la reĝisoron Árpád Jutocsa Hegyi [arpad jutoĉa hedji] – same laboranta je komenco de la jardeko ĉe la Nacia Teatro de Miŝkolc. Post unujara paŭzo László Kovács daŭrigis la pioniran iniciaton kiel ĉefdirigento de la Simfonia Orkestro de Miskolc, - bedaŭrinde nur al unu somero. (1986.)

La 18-an de julio en 1981 okazis prezento de la „Kaŝita geedzeco” en korto de la Kulturdomo „Kossuth”. (Korto de muzikantoj/Muzikanta Korto), kiel komuna entrepreno de

la Nacia Teatro de Miskolc kaj la Urba Kultura Centro. Ni povas taksu ĝin kiel vakuon pleniganta eksperimento, - ja preskaŭ de kvaron-jarcento ekde ĉeso de la opergrupo, ekzistis la vakuo. Estigantoj de la premiero; Georgo Selmeczi kaj Árpád Jutocsa Hegyi, fidele al tradicioj de la artospeco (de Napolo) igis la farsan operon de Cimarosa al la spektantaro tutanime akceptebla komprenebla, laŭ difino de la kritikistoj. Ili neglektis la kutimajn, ceremoniajn eksteraĵojn de la operludoj: nome la Muzikanta Korto „ kaj efektive kaj metafore traformiĝis ĝardeno de drinkejo de majstro Geronimo, kie surtabligitaj estis kaj vino kaj manĝaĵoj de Napolo al la muziko.” (Déli Hírlap/Tagmeza Ĵurnalo – 20. julio 1981.)

Pri etoso de la teatraĵoj kolorriĉan bildon pentras raportante la „Vespera Ĵurnalo” (en ĝia numero 27a de julio en 1981): ”La publikon atendas ne seĝovicoj, sed preparitaj blankaj tabloj, sur kiuj estas menuokarto de «Drinkejo de Geronimo», regale kvinspecajn ŝpagetojn kaj sandviĉojn varmajn kaj malvarmajn. Sur ĉiuj tabloj kandeloj brulas. La kuiristoj faras la manĝaĵojn ĉe fino de la spektantejo, kelneroj zig-zagas inter la tabloj, sed silente, ne ĝenante la muzikon kaj la atenton al la scenejo. [...] Komence de la manĝa-drinka amuziĝo la reĝisoro kaj la dirigento aperas inter la tabloj, kaj prezentas la rolantojn salutantaj kun komencaj vicoj de malnovaj ŝlagroj [...], kiuj poste suriras la scenejon, por ke post tio ĝis ilia propra reapero ili foriru malantaŭen al la kulisoj.” La reĝisora koncepto klopodis fari la teatraĵon ankaŭ el alia vidpunkto pli proksima al la vivo, kompare kun la tiuepoka teatra ekzerco trostreĉitan, naturalistan akcenton metante al evento de la erotiko. (Ĝian rektan antaŭaĵon signifis la grandteatra publika prezentaĵo de la „*Regino-Ĉardaŝ dum la sezono 1980/1981*.) Simplaj sed efikplenaj dekoracioj de Stefano Ferencz lasis sukceson atingi la „Muzikantan Korton” pere de ties ĉiutaga natureco (nome sur la scenejo nur unu seĝo estis). Sur arbojn streĉitaj toloj kreis etoson de la ĝardeno Mediteranea; bone konformiĝis al tiu ĉi atmosfero kostumoj de Agnesa Máger. (Déli Hírlap/Tagmeza Ĵurnalo – 20. julio 1981.) La grupo de gekantistoj konsistigis venintojn el teatroj de Budapeŝto (Johano Bandi, Brigitta Kovács. Tomaso Szüle), el urbo Győr (Béla Perencz), kaj el Miskolc (Suzana Csonka kaj Anna Molnár). Plivastiĝinta orkestro de la Nacia Teatro de Miskolc muzikis dum la teatraĵoj. Laŭ la kritiko la publika prezentaĵo estis pretendema, al kiu dum la somero krom la scenejon „Muzikanta Korto” donis ankaŭ la Sziget-eszpresszó/Espresejo-”Insulo”/ ĉe la boata lago de Miskolc-Tapolca. Ĝi akceptis oficialan rekonon: en decembro pere de la Ministerio pri Kulturo ĝi estis premiita per la premio-Nivelo. (Pri transdono de la premio-Nivelo raportas la tagĵurnalo *Északmagyarország/Nordhungario*, n-ro 9. decembro 1981.)

Forpase de unu jaro, en julio de 1982 oni renovigis la teatraĵon „*Laŝita geedzeco*”, kiun sekvis premiero de la „*Don Giovanni*” en la Muzikanta Korto lasta tage de la monato. Plejparte favora prijuĝo akompanis la tiujaran laborprodukton de la tn. „stagione-trupp/sezona trupo: „ de la Somera Muzika Teatro funkcianta per protekto de la Urba Kulturcentro ĉi tiu estis sia lasta prezento, kaj el arta heredaĵo de la unuaj jardekoj de la 20. jarcento ĉerpanta publika prezentaĵo estis „La bovo sur la tegmento” titola kunmetaĵo, kaj dum la pasinta sezono prezentita farsa opero; „*Kaŝita geedzeco*” de Cimarosa. „La opertrupo kun klasikaĵo de Mozart estigis memstaran, altan nivelon havan subĉielan sezonon” - la tutlaboron de la opergrupo taksis tiel la kritikisto de la gazeto „Nordhungario”. (4. aŭg. 1982.) Sed tiu ĉi opiniita riĉeco – okulfrapa varieco de la muzikaj programoj – povas ŝajni ĝuste malriĉeco kompare al la grandiozaj perspektivoj de la originaj imagoj. Spite de spertoj de la 1981 jara somero, ekflamiĝinte, la Departementa kaj Urba Kultursekcio kaj la Fremdultrafika Komitato komisiis sinjorojn Georgo Selmeczi kaj Árpád Jutocsa Hegyi, por plani al 1982 grandpretendan, Eŭroponivelan festivalon al Miskolc! Ni heredis la de ili faritan programplanon de la 1-a Miŝkolca Somero (1982) el 1981, en formo de dokumento 10 paĝaj tajpita el 1981; (trovejo de la de mi vidita ekzemplero estas en la Lokhistoria Kolektaĵo de „II. Rákóczi Ferenc” Departementa Biblioteko. (1982. jaraj publik-kulturaj dokumentoj.) laŭ ĝia teksto „ĝi determinas tiun solan voj-eblecon, kiu cerigas estiĝon de unu Miŝkolca tradicio kaj ties vivopova ekzisto por longaj jaroj antaŭen”. Rigardante la iaman riĉan – sed al la 1980-aj

jaroj ŝajne forgesitan - kulturalan pasinton de la urbo - iomete doloreme efikas la paradoksa rekono: „Miŝkolcon ĝuste ĝiaj mankantaj tradicioj rajtigas por la entreprenema vojserĉo kaj por utiligi la larĝan Eŭropan horizonton”. En teksto de la tajpita skribaĵo konkrete troveblas la festival-penso: „Nia plano klopodas krei plenvvaloran festival-strukturon el tiuj arto-ĝenroj, kiuj jam estiĝis en la antaŭaj jaroj”. Kiuj fine realiĝis de la surpaperigitaj grandiozaj pensoj, tiuj estas konsterniĝe treege malmultaj – sed samtempe evidentas, ke pro tiu negativa fakto oni tute ne rajtas kulpigi la programfaristojn ekscititajn pro la agemo, kaj la fak-amantajn muzikist-kolegojn!

Simile al la prezentoj de teatraĵoj de Cimarosa, la reĝisoro koncepto de Árpád Jutocsa Hegyi baziĝis, ankaŭ kaze de *Don Giovanni*, je utiligo de la tuta teritorio de la Muzikanta Korto; dum la finalo oni eksonigis ankaŭ la najbaran preĝejan-sonorilegon. Ankaŭ ĉi tiam per la kolor-mondo de la simplaj sed ornamefikaj dekoracioj de Stefano Ferencz bone harmoniis kostumoj de Agnesa Máger. Ĉirkaŭaĵon de la enirejo ornamis portretoj de rolantoj de la opero (kiuj estis verkoj same de Agnesa Máger). La teatraĵ-prezentoj estis direktitaj de Georgo Selmeczi kaj László Kovács; elstaran kantistan labor-produkton donis Tomaso Szüle kaj Suzana Csonka [ĉonka].

En julio de 1983 estis denove prezentinta la „*Don Giovanni*” en la Muzikanta Korto, sed tiu jare, origine oni volis prezenti ĝin en la fortikaĵo. (Déli Hírlap/Tagmeza]urnalo 29. junio 1983.) La dua planita operprezento de la „Miŝkolca Somero '83” estis: junaĝa teatraĵo de Mozart, la „*Simulita naiveco*” atingis la publikan gxeneral-provon. Al ĝia unua orezento povis veni eblo nur sekvontjare en la Junulara Parko „Gárdonyi” de Görömböly servanta kiel nova operludejo, la 27-an de junio en 1984. Apud ĝi simile novajn scenejojn signifantaj Subĉiela Kinejo de Miskolc –Tapolca, kaj la Espresejo de la „Sziget”/Insulo/ certigis lokojn por la pluaj prezentoj. La pikantan teatraĵon reĝisoris László Cselényi [ĉelenji] kaj la dekoracioj estis verkoj de la skulptoartistino Eva Varga. La rolantaro konsistigis kantistojn el kantistoj de la Operdomo, la Opereto-teatro, la Nacia Teatro de Miskolc kaj la Filharmonio. La prezentojn estris Georgo Selmeczi kaj László Kovács [kovaĉ]. La kritikistoj, aprecante ludon de la grupo, menciadis neserĉatan, naturan senĝenecon, al kiu aliĝis surprizoj de la reĝisoro: al la tutkomforto de la prezento preskaŭ dramaturge konvenajn drinkaĵojn, varmegan teon regadis oni en kelkaj tendoj.” Pli malfrue la kantistoj alvenis sur dorsoj de azenoj al la okazejo: „vere ĉi tiel komenciĝus la publika prezentaĵo, kvankam tiam jam okazis ankaŭ la uverturo, kiu eksonis kun same tia natureco, ke ni povas akcepti kiel veron, ke la teatraĵo komenciĝis tiam, kiam premante inter niaj manoj la glason da vino, aŭ sorbante varmegan teon, ni cerbumis, al kiu tablo ni sidiĝu. Do, tiam komenciĝis, kiam ni akceptis la ĉirkaŭaĵon – ludregularon - kaj ankaŭ ni kiel incitaj rolantoj jam stabiligis la realaĵon de la kuliso. Ĉi tio estis granda artifiko de reĝisorado de László Cselényi”. – ni povas legi en kritiko de la gazeto „Nordhungario”.(3. julio 1984.) La spontana improvizo penetris la tutan publikan prezentaĵon, al kies senmanka sukceso mankis nur la laŭdeva propagando de la urbaj organizantoj.” (Vidu kritikon de Petro Várnai en la numero de gazeto 10. aŭg. 1984-a de „Magyar Hírlap”/ Hungara Novaĵ-gazeto.)

Plenvvaloran renoviĝon portis kun si mem prezento de la „Frizisto de Sevilla” reĝisorita de Nikolao Szinetár [sinetar] (14. julio 1986.) – por ke sekvante kvin vesperojn ĝi fermu la vicon de la someraj operaj publikaj prezentaĵoj de la 1980-aj jaroj. La teatraĵ-prezentoj okazis jam en la nova scenejo apartenanta al la historia interna urbo-kerno, sur la Subĉiela Scenejo de la Interna Urbo.

Ĝia spektantejo taŭganta por akcepti 350 homojn estas necesa, ĉar pli frue en la Muzikanta Korto entute nur 160 homoj havis lokon komforte, sed 200 tre malkomforte. La premiero kaj la inaŭguro de la nova scenejo okazis samtempe, pri la eventoj ni citas el la numero 16. julio 1986a de la tagĵurnalo Északmagyarország/Nordhungario:” Lundo-vespere okazis en Miskolc inaŭguro de la Subĉiela Scenejo de la Interna Urbo, sen ceremonio. La spektantoj aĉetis siajn enirkartojn, okupis lokojn sur podioj de la spektantejo konko-forma

kaj kiam je la 8-a horo kaj tridek de malproksimo tien aŭdiĝis kariljono de sonorilega turo de monto Avaŝ, dirigento László Kovács paŝis antaŭ la Simfonia Orkestron de Miskolc, du dekoraci-laboristoj malfermis unu grandiozan muziknoton – sur ĝi la titolo UVERTURO – kaj komenciĝis la unua teatraĵ-prezento sur la nova scenejo de Miskolc”. Tiu okazis en inspiranta ĉirkaŭaĵo: „Iama monaĥejo de la korto-Minorita kadras de tri flankoj la ludejon kaj ankaŭ la spektantejon. La dens-foliaj arboj preskaŭ faras tegmenton super la scenejo. La lumigita muro de la konstruaĵo kaj la turo de la preĝejo leviĝanta super la tuton, bonefikas. Altigita scenejo ne estas. La ludo daŭras sur la „tero”, la dirigento direktas la orkestron aŭ antaŭ la muzikistoj, aŭ sidas ĉe la fortepiano, aŭ li ĵus promenas ĉirkaŭ la scenejo apuda putu kun la rolantoj, kelkfoje venas sur la scenejon kaj tuj meze de la ĥoro direktas li la muzikon [...], nome ni povas partopreni ludeman, al la spektantoj proksiman, publikan prezentaĵon. La rolantoj estas de la unua vicaj spektantoj al apenaŭ unu kaj duonmetra-du metra distanco, malsuprenvenas inter ilin.”

Sinjoro Szinetár reĝisoris sian reĝisoradon Miŝkolcan, baze de la pli frua televida publika prezentado de la Frizisto de Sevilla. La dekoracioj estis laboraĵoj de Nikolao Fehér, la kostumojn pretigis Judita Szekulesz [sekules], laŭ la konsisto la kantistan-trupon konsistigis membroj de la muzika trupo de la pli fruaj someroj.

- Ni daŭrigos -

Jardatrevenoj

530 jarojn antaŭ la nuna mortis Janus Pannonius (Johano de Csezmice [Janoŝ de Ĉezmice aŭ alinome Johano de Hungario, nask.29. aŭgusto 1434 Csezmice - †27. marto 1472 Medvevár]. Li estis episkopo de urbo Pécs, la unua laŭnome konata hungara (-horvata) poeto kaj humanisto. http://eo.wikipedia.org/wiki/Janus_Pannonius

En lia rekonigo en Hungario havis grandan rolon la per „Kossuth-premio” honorigita hungara poeto, arta tradukisto Csorba Győző ([Viktoro Ĉorba, nask. 21. novembro 1916. Pécs, † 13.septembro 1995 Pécs). La mezepokan kaj modernan eŭropan liron same tradukinta poeto estis – inter ceteraj – interpretisto de ankaŭ Goethe kaj Brecht. http://eo.wikipedia.org/wiki/Győző_Csorba Sed la malsupran poemon de Janus Pannonius vidu esperantigite de nia granda esperantista hungara poeto Kálmán Kalocsay

Janus Pannonius: Pro pace – Békéért

(Hungarigis: Viktoro Csorba)

Janus Pannonius: Pro pace – Por la paco

(Esperantigis Kálmán Kalocsay)

Dio, ho, vi granda estro en la ĉielo trans la steloj,
 milde alrigardu nian turpan teron, kie milit'
 frenezega pereigas pacon, kaj kie Mars' kuregas
 tintigante glavon. Siro! Ekstermiĝas are la viv'!
 Ho, ĉi teron benu, Patro: al popol' trankvilo necesas,
 doloregas batalvundoj kaj tiele trista la mort'!

(La poemon el la „Kolektaĵo Fajszí” sendis s-ino Anikó Nemeš esperantlingva fakreferento el la Landa Fremdlingva Biblioteko (OIK) Budapeŝto)

295 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis la aŭstra imperiestrino-hungara reĝino **Maria Tereza**

http://eo.wikipedia.org/wiki/Maria_Tereza_de_Aŭstrio

195 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis kaj antaŭ **130 jarojn** mortis la **hungara poeto Arany János** [johano aranĵ] http://eo.wikipedia.org/wiki/János_Arany

170 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **Kőrösi Csoma Sándor** (1784-1842) fondinto de la Tibetologio http://eo.wikipedia.org/wiki/Sándor_Kőrösi_Csoma

130 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis kaj antaŭ **45 jarojn** mortis **Kodály Zoltán hungara komponisto**. http://eo.wikipedia.org/wiki/Zoltán_Kodály Tiu ĉi okaze en la Budapeŝta OIK oni anoncis prelegon pri la fremdlingvaj verkoj de Zoltán Kodály, je la 11an de majo 2012: pri la italaj kaj angla lingvaj verkoj. Prelegis: Mikelo Itzész, kunul-prezidanto de Asocio Kodály. Antaŭ kaj post la prelego en la Biblioteko rigardebla estis ekspozicio titolita: „Kulturo-kreanta artisto Zoltán Kodály (1882-1967).”

125 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis kaj 90 jare mortis Karlo la unua aŭstra imperiestro (sed reĝo Karlo la kvara en Hungarujo). [http://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo_la_1-a_\(Aŭstrio\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo_la_1-a_(Aŭstrio))

125 jarojn antaŭ la nuna aperis la unua libro pri la lingvo Esperanto verkita de **d-ro L.L. Zamenhof**, kaj antaŭ 95 jarojn mortis la kreanto de la Internacia lingvo. Memoron de kreinto de Esperanto, memortabulo gardas en Miskolc, la nomon Esperanto heredigas al la postepoko publikarea prinomo kaj memortabulo. Li skribis jene en 1888 en la dua eldono de kajeroj pri Esperanto, la lingvo internacia:

„Antaŭparolo

Elirante ankoraŭ unu fojon antaŭ la estimata publiko, mi sentas la devon antaŭ ĉio danki la legantan publikon por la viva kunsento, kiun ĝi montris por mia afero. La multaj promesoj, kiujn mi ricevas, kaj el kiuj tre granda parto estas subskribita "senkondiĉe", la leteroj kun kuraĝigoj aŭ konsiloj--ĉio tio ĉi montras al mi, ke mia profunda kredo je l' homaro min ne trompis. La bona genio de l' homaro vekiĝis: de ĉiuj flankoj al la laboro ĉiuhoma venas amasoj,

kiuj ordinare estas tiel maldiligentaj por ĉia nova afero; junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj--rapidas porti ilian ŝtonon por la granda, grava kaj utilega konstruo. Vivu l' homaro, vivu la frateco de l' popoloj, vivu eterne!...”

125 jarojn pli frue en 1887 fondiĝis la **Akademio Volapuka** (Kadem Bevünetik Volapüka), sed la lingvo starta en 1880, post la komencaj sukcesoj pro apero de Esperanto, perdis aron de siaj parolantoj.

120 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **d-ro Györy Nagy Lajos** [lajoŝ/ludoviko Djori Nadj](1892-1980). Li ekirigis kun d-ro Kálmán Kalocsay la unuan esperanto-lingvokurson en Miskolc, 1913. En Miskolc ilian nomon publikarea prinomo gardas.

115 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **Szathmári Sándor** [ŝandor/aleksandro satmari](19. junio 1897 Gyula, † 27. septembro 1974 Budapeŝto) verkisto, maŝinĝenero, esperantisto, unu el la plej grandaj figuroj sur la beletra kampo de la Internacia Lingvo. (Rimarko el la revuo Esperanto 11/1974 (827) http://eo.wikipedia.org/wiki/Sándor_Szathmári

115 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **Kökény Lajos** [lajoŝ/ludoviko kokenj] http://eo.wikipedia.org/wiki/Lajos_Kökény

110 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **Tárkony Lajos**. Li diris la adiaŭparolon dum la entombiga ceremonio pri Ludoviko Király, nomdonanto de nia Esperanto-Amika Rondo en Miskolc. http://eo.wikipedia.org/wiki/TÁRKONY_Lajos

110 jaras la Hungara Esperanto-Asocio. Prezidanto de la Hungara Landa Esperanto-Asocio (1911-1923) d-ro Giesswein Sándor inaŭguris en Miskolc la Unuan Esperanto lingvokurson anoncitaj kaj gviditaj de d-roj Ludoviko Györy Nagy kaj Kolomano Kalocsay en 1913. Memoron de la prezidanto memortabulo gardas en Dombóvár.

100 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **ÖRKÉNY István** [Oerkenj Iŝtva'n] unu el la plej popularaj hungaraj novelistoj (5-a de aprilo 1912; 24-a de junio 1979). Legu pri li plie, ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/István_Örkény

100 jara estos en la 28an de novembro 2012, ke **Albanio sendependiĝis** de la turka superregado. <http://eo.wikipedia.org/wiki/Albanio>

kaj pri himno de Albanio:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Nacia_himno_de_Albanio

90 jarojn antaŭ la nuna naskiĝis **s-ino Pallós Istvánné** (1922-1995) [Elizabeta Palloŝ] la hungara organizanto de la Monda Turismo. En Abaliget (en Suda Hungarujo) ŝi 25 foje aranĝis Renkontiĝon de Naturamikoj. Unu fojon ankaŭ mi partoprenis kiel sekretariino kaj samtempe turisma respondeculino de la niaregiona Esperanto-Komitato en Norda Hungarujo. La tuto estis neforgeseble interesa. Belsona, tre valora aranĝaĵo estis la IREN (Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj). Per tiuj aranĝaĵoj iĝis ŝi unu el la plej valoraj membroj de la tiama hungara esperantista-movada gvido.

70 jarojn antaŭ la nuna mortis en Mort-koncentrejo de nazioj en Treblinka (Pollando) **Lidija, Sofia kaj Adam Zamenhof**; la tri infanoj de kreinto de la lingvo Esperanto.

Antaŭ **45 jarojn** mortis **d-ro Szilágyi Ferenc** (1895-1967) [francisko siladji] en Svedio vivinta hungara poeto, tradukisto, ĉefredaktoro de la Norda Prismo, sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA.

Antaŭ **45 jarojn** mortis **Baghy Gyula** (1891-1967) [julio bagi] hungaro, granda figuro de la esperanto-literaturo.

-Antaŭ **10 jarojn** mortis **Hules Béla** (1926-2002) [adalberto huleŝ] hungara poeto, filozofo, esperantisto, pri kiu la Hungaria esperanto-Asocio rememoris per florkronado je datreveno de lia morto.

Antaŭ **5 jarojn** mortis **Csiszár Ada** (1920-2007) [s-ino ĉisa:r] prizorganto de literatura heredaĵo de d-ro Kolomano Kalocsay.

Antaŭ **5 jarojn** mortis **Gergely Mihály** (1921-2007) [gregorio gergej] verkisto, poeto, ĵurnalisto, ĉefredaktoro de la revuo Hungara vivo.

Benataj estu ĉiuj!

La tekstojn verkis, kompilis s.-ino Adrienne Pásztor

Sporto

Mi ekde majo partoprenas en la Esperanto-Sumoo. Se vi ne scias, kio estas Esperanto-Sumoo, rigardu la paĝojn <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>. Ĝin gvidas HORI Jasuo en Japanio. La sekva Sumoo okazos julie. Aliĝu ankaŭ vi al la junia Sumoo.

Sylvia Hämäläinen, Tampere, Finnlan

Ni funebras



Foto de la Google

„Mi bedaŭre informas vin, ke mia patro, **Péter András Radoš** (Radozo), prominenta figuro de la esperantista movado, la aŭtoro de nombraj esperantlingvaj literaturaj tradukoj, unu el la ĉefaj organizintoj de la Budapeŝta UK de 1983, unu el la inventintoj de la t.n. Pirata Metodo kaj motoro kaj instruisto de la „Fiŝkursoj”, last-sabate, neatendite forpasis.

Lia **entombiga ceremonio** okazos vendrede, la **9-an de marto 2012**, je la 10-a horo, en Budapeŝto en la Israelita Tombejo de la strato Kozma. Ni atendas ĉiujn esperantistojn konintajn lin, kaj kiuj deziras esprimi siajn kondolencojn. En la nomo de la funebranta

familio: Maria Rados”

Péter Rados estis bone konata kaj rekonata en hungara Esperantujo pro lia aktiveco. Dum kelkaj jaroj li prelegis pri literaturo ankaŭ en la Esperanto-fako de ELTE. Ankaŭ nome de ILEI, mi esprimas sincerajn kondolencojn okaze je la forpaso de Petro Rados. Aldone al grandaj literaturaj meritoj, li havis klarajn ideojn pri la instruado de nia lingvo; li sisteme kaj plenforte realigis ilin, interalie pere de la fiŝ-kursoj kaj - klubo, tra kies pordoj pasis miloj da junuloj. Lia kontribuo al pedaogio en Hungario grandis. Sed nun nia fiŝkaptisto demetis la reton; restas por aliaj transpreni la defion.

Kore kaj dolorplene Stefan MacGill

Janus Pannonius: Laus Pannoniae

(Latina originalo)

Quae legerent omnes, quondam dabat Italia Tellus,
Nunc e Pannonia carmina missa legit.
Magna quidem nobis haec gloria; sed tibi maior,
Nobilis ingenio, patria facta, meo.

Janus Pannonius: Laŭdo de Panonio

Traduko de Péter András RADOS

Kion ĉiu legis nur donitis de la tero Itala.
nun jam estas ĝi leganta versojn el la land' Panoni'.
Grandas vere tiu gloro, per ili de mi akirita,
kvankam mia lando plie gloras, tamen pere de mi.

[La poemon sendis s-ino Anikó Nemeš el la kolektaĵo Fajszí (de OIK , Budapeŝto)]

Plie pri la mortinto legu, ĉe

(http://eo.wikipedia.org/wiki/Péter_Rados#P.C3.A9ter_Andr.C3.A1s_Rados)

KÁROLY TAMKÓ SIRATÓ

Vagabonda Paŭl'

Frat',
fraŭl',
franda
fraŭl'.

Kie iras Paŭl'?

Ĉu ĉe l'maro?
En montaro?
Tra l'tondranta
Niagara?


Kie vagas
forsopira,
vulkan-ira,
nubo-ŝira
vagabonda Paŭl'?

En Bajkalo, fiŝa balo;
tie li sub akvofalo

ĉerpas ŝaŭmon kaj bobelojn
por trinkigi la libelojn,

22





Poemo aperis en la infanpoema volumo Hundbazaro.

(La literaturaĵojn de Rados, Péter András sendis s-ino Helena Böde emerita bibliotekisto de OIK)

La 18-an de aprilo, en sia 84-a jaraĝo mortis **doktoro Otto Haszpra** [otto haspra], membro de la Hungara Scienca Akademio, membro de Akademio de Esperanto, kaj honora membro de UEA.

Otto Haszpra verkis pli ol 1000 sciencajn publikaĵojn (librojn, studojn, artikolojn, ktp), multajn el ili en Esperanto. Li estis unu el la plej elstaraj kaj meritplenaj figuroj en la historio de Esperanto pri la evoluigo de scienca aplikado kaj faka lingvaĵo de Esperanto. Kune kun d-ro Árpád Máthé li fondis kaj redaktis la unikan revuon "Sciencaj Komunikaĵoj" aperinta kiel suplementaĵo al Budapeŝta Informilo inter 1974-82, en kiu li verkis pionirajn artikolojn en pluraj fakoj...

Libera Folio skribis pri li:

"... Otto Haszpra naskiĝis en 1928. Li estas emerita profesoro de la hidro-konstrua katedro de la Teknika Universitato de Budapeŝto, eksperto de UN, membro de la Hungara Akademio de Sciencoj. Esperanton li lernis en 1958. Li estis estrarano kaj vicprezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, komitatano kaj estrarano de UEA. Ekde 2004 li membras en la akademio de Esperanto.

Li ankaŭ estis gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto komence de la 1980-aj jaroj. Li aperigis multajn sciencajn kaj popularsciencajn artikolojn en Esperanto, kaj ankaŭ multe prelegis. En la jaro 2000 aperis lia ampleksa lernolibro de Esperanto por hungaroj. Li ankaŭ aŭtoris studojn pri la kostoj de multlingveco, de lingvolernado, kaj pri egalrajteco kaj ekonomieco en la internaciaj rilatoj. ..."

<http://www.liberafolio.org/2006/uk0804b>

Biografio de Ottó Haszpra en la retejo de Akademio de Esperanto:

Ottó Haszpra (Budapest, 1928-2012). 1946-51: univ. studento pri ekonomiko, sed pleje pri konstrucia inĝenierio. 1952-: dipl. konstrucia inĝ. 1967-: universitata dr., 1973-: akademia dr., 1994-: dipl. Europa inĝ. Membro: 1983- de AIS, 1986-: de ISA Comenius, 1997- de la New York Acad. of Sc., 1998- de la Hungara Sc. Akad. 2004- de la AdE, kaj de pluraj hung. kaj int-nac. fakaj asocioj kaj komisionoj.

1951-56: asistanto, adjunkto de la Matematika Katedro de la Trafikteknika Universitato.

1956-79: esploristo, sekcigvidanto, instituto-gvidanto, konsilisto, sc. vicdirektoro de VITUKI (= Sc. Esplorcentro de Akvomastumado). 1959: lernas Esperanton kaj tuj komencas vastan korespondadon pri faka aplikado. 1968-69: Ford-stipendiulo en Usono, survoje prelegas angle kaj Esperante en Usono-Meksiko-Havajo-Novzelando-Australio-Honkongo-Hindio-Etiopio-Aŭstrio-Hungario, pli poste en 50 aliaj landoj, de Brazilo kaj Kubo ĝis Ĉinio kaj Japanio, enkadre de studvizitoj, konferencoj kaj eksportlaboroj. Lia ĉefa esplortereno estis modeleksperimentoj pri planataj hidroteknikaj konstrukcioj. 1973-: Organizas dekjaran scienca prelegserion en la klubo Konkordo. 1974-82: redaktanto de la Sciencaj Komunikadoj. 1978-91: estrarano kaj vicprezidanto de la Hungara E-Asocio, 1986-89: estrarano de UEA, ambaŭloke responsa pri faka agado.

1979-96: profesoro de hidraŭliko kaj parenctemoj, katedrogvidanto, institutdirektoro ĉe la Budapeŝta Teknika Universitato. Plue membro aŭ gvidanto de nombraj fak-asociaj kaj akademiaj komisionoj. Krom fakverkista agado, ĉefe en la hungara kaj angla, li multe kontribuas al la esperantlingvaj fakliteraturo kaj beletra tradukado.

1996-: pensiulo, tamen aktiva, sed de 2005 pli kaj pli laboras nur por Esperanto (beletra tradukado, sc. esplorado, sc. verkado).

La nombro de liaj diverslingvaj publikadoj (libroj, studoj, artikoloj, originalaj kaj tradukitaj) estas ĉirkaŭ 1000. Ties triono estas pri kaj por Esperanto (en Esperanto kaj aliaj lingvoj).

<http://akademio-de-esperanto.org/faktoj/biografioj/haszpra.html>

Ne multajn personojn mi rekonas kiel sekvinda modelo en la Esperanto-movado, sed Haszpra Ottó ekde mia juna aĝo estis unu el tiuj... Sincere mi funebras lian foriron.

Szilvási László

Anoncoj pri aliaj grandaj perdoj

„Karaj geamikoj,

... forpasis **Josi Shemer**, 61 jaraĝa. Unu el la pilieroj de la Israela Movado dum pli ol kvar jardekoj kaj internacie konata kaj ŝatata esperantisto, li estis longjara redaktoro de la revuo "Israela Esperantisto", antaŭa prezidanto de ELI kaj nun ĝia sekretario kaj kasisto. Dum multaj jaroj kaj ĝis nun li senlace gvidis la Tel-Avivan klubon kaj estis UEA-delegito en Tel Avivo. Estu lia memoro benata.- prof Amri Wandel marto 30, je 1:53atm -" (De la face-book)

„Kara s-ino Pásztor,

Kun profunda doloro mi jam pli frue eksciis pri la forpaso de s-ro Shemer. Malfeliche mi ĵus eksciis ankaŭ pri la forpaso de **d-ro Rokuro Makabe**, japana okulkuracisto kaj fidela esperantisto, kiu longe vivis en Germanio. Hieraŭ sabate mi ĉeestis funebran ceremonion de la nederlanda esperantistino **Catrien Bossong**. Estas malfeliĉa tempo, ĉar tro multaj meritplenaj esperantistoj forpasas ...

Fine mi kore dankas pro viaj bondeziroj okaze de Pasko, kaj mi varme reciprokas ilin.
Osmo Buller”

Ĉinaj proverboj

Du jaroj necesatas por ellerni la parolon, sed la tuta vivdaŭro malsufiĉas, ke oni ellernu silenti.

La leĝo estas ĉiam racia, klara – kontraŭ la homo.

La homa havaĵo tia estas, kia la roso estas sur la herbero.

(Tradukis s-ino Adri Pásztor)

Instruo – ekzameno

La 9an de junio okazos Tutmonda skriba KER-ekzameno. Certe vi scias pri ĝi. (Se ne, en www.edukado.net/ekzamenoj/ker/ troviĝas scioj.) Mi estas la organizanto en Finnlando. Ni havas naŭ ekzameniĝontojn, kio estas bona kvanto. La ekzameno estas grava okazo, ĝuste kiel la abitura ekzameno estis almenaŭ kiam mi faris ĝin antaŭ 52 jaroj. Ofte Katalin Kovats sendas sciojn aŭ konsilojn al la organizantoj en 17 landoj. Ŝi faris grandan antaŭlaboron.

Sylvia Hämäläinen, Tampere, Finnlando

Doktorino Anna Oršoš

La Lingvoj Beaŝ-aj en Hungario

Parto II-a

I.3. Prinomoj de la Ciganoj

La tradicia hungara nomdono de la etna komunumo estas: **cigány** (Cigano). Similas al la hungara la nomoj Rumana: **’tigan**, la ĉeĥa: **’cikan**, la germana: **’Zigeuner**, la franca: **’tzigane**, **’tsigane**, la itala: **’zingaro**, kaj la turka: **’çingene**. Ĉiu esprimo estas alkondukebla al la greka vorto **’atsiganos**, kies signifo estas: la „forpuŝita”. La tradicia prinomo de la Ciganoj angle **’Gypsy**, hispane: **’gitano**. La origino de tiuj ĉi nomdonoj estas la latina **’aegyptanus** (Egiptia). La latina nomo de la Ciganoj en la mezepoko **’populus Pharaonis** (popolo de Faraono), pli poste **’cinganus** estis. (Nagy 2005:8).

La Hungariaj Ciganoj plejofte akceptas la popol-nomon **’cigány**, samtempe ĉiu de la tri grandaj grupoj da Ciganoj distancigas, diferencigas sin de la alia. Rezulte de tio la grava parto de la Hungari-landa Ciganaro nomas sin – ekzemple la Vlah-ciganoj al roma, la pli multo de la Romungroj kaj la Beaŝoj nomas sin „cigány”(Cigano), do ne „roma” kontraŭ tio, ke en la publikvivo kaj en la politika vort-apliko konkeras la nom-dono „roma”, kiu aludas nur al la etna subgrupo en la lingvo Romani, la signifo de la vorto „rom” estas „viro”, „edzo”, dum la plurala figuro de la vorto la „roma” signifas viroj’, kaj homoj’. La ingenra paro de la esprimo estas la **’romanji**: „roma- nő, asszony, feleség” (roma virino,

sinjorino, edzino). Kvankam dividiĝas la opinio pri la uzo de terminoj, la ĉiam disvastiĝanta samranga uzo de la vortoj cigány/roma povas doni solvon por ĉiuj.

I.4. La lingvoj Ciganaj

La lingvoj de Ciganoj apartenas al la indoeŭropaj lingvoj (vidu la I. numeran aneksaĵon. En la tuta mondo la nombro de unu grupo de Ciganoj parolataj la lingvon Romani estas pritaksebla inter kvin- kaj dek milionoj, tamen tia etna situacio, ke – kontraŭ la internaciaj fortostreĉoj – ĝis nun unuavice ĝi ekzistas ne kiel standarda, parolata lingvo, sed nur en formoj de nekalkuleblaj regionaj dialektoj (Réger-Kovalcsik, 1999). El inter la Ciganaj lingvaj grupoj pri la Beaŝ-oj - parolantaj iun arkaikan dialekton de la lingvo Rumana - ni scias eĉ malpli, ol pri la antaŭa grupo. Pri ilia nombro, teritoria situo, vivmaniero nek pli malnovaj publicaĵoj, nek esploroj parolas, nur mallongaj aludoj troviĝas malofte en la verketoj laŭteme pri Ciganoj. Tio povas havi multajn kaŭzojn. Ofte klarigebla estas ankaŭ per tio, ke la dominantan lingvon parolantoj de la majoritata socio multfoje ne povas fari distingon inter la diversaj Cigan-grupoj. Plej ofte oni rigardas homogena komunumo la komunumon de parolantoj la lingvojn Romani kaj Beaŝa. Ankaŭ tiu ĉi povas kaŭzi, ke apenaŭ estas troveblaj informoj koncernaj pri la Beaŝoj kaj nur pri la lingvo Beaŝa, sed ankaŭ nur tiuj fontoj kiuj parolas pri la „Ciganoj” ĝenerale sen precizaj lingvaj difinoj ofte estas nekontroleblaj kaj malprecizaj. Laŭ la Beaŝojn aparte menciitaj fontoj tiu ĉi popolgrupo migris al ĝia nuna vivloko antaŭ pluraj jarcentoj, dum la fino de la 17-a kaj je komenco de la 18-a jarcentoj. (Saramandu 1997:109).

„Krom la Hungarlandaj Beaŝ-oj same la lingvovarianton similan al la Rumana parolas oni en: Bulgario, Kroatio, en la Rumania Oltenio, en Vojvodino (Serbio), Bosnio, Slovenio kaj la Beaŝoj en Grekujo. Do unuavice la dialektaj proprecoj helpas nin por malkovri kie vivis kune iam la Beaŝoj, disiĝantaj en Meza- kaj Suda Eŭropo.” (Borbély, 2001:79).

Laŭ la universitata instruisto Marcel Courthiade laboranta en Parizo en Instituto de Orientaj Lingvoj kaj Civilizoj, Beaŝ-lingvon parolantoj vivas krom la supre menciitaj landoj ankaŭ en Slovakio, Argentino kaj Kolumbio. (Kenrick, 1993).

La dialektajn variantojn de Beaŝa-lingvo uzatajn en diversaj landoj, kaj historion de ilia elformiĝo, ni ne konas. En tiuj landoj same mankas ankaŭ la priskribo de iliaj fonologia kaj gramatika sistemoj. Konsidere al tiu ĉi fakto, la skriba tradicio de Beaŝoj vivantaj nialande montras multe pli progresan staton ol la aliaj Beaŝaj komunumoj vivantaj en la ĉirkaŭantaj landoj. La Beaŝoj vivantaj en Hungarujo unuavice – pro proksimo de la landlimo – havas kontaktojn kun Beaŝoj vivantaj en Kutina de Kroatio, Veróce, Csáktornya (Ĉaktornja), krome en Oromhegyes (Oromhedjeŝ) de Serbio kaj en Timiŝoara en Rumanio. Laŭ niaj lingvaj spertoj - akiritaj el la kontaktoj flegitaj kun la menciitaj komunumoj – pravas, ke la tie vivantaj Beaŝoj parolas lingvan varianton similan al la dialekto de la Hungarlandaj-Beaŝoj. Elformiĝo de ilia skribo okazis en nia patrujo dum la jaroj 1990-aj kaj progresas rapide, sed en rondo de la vivantoj en la ĉirkaŭaj landoj, tiu plejmulte estos tasko de la sekva jardeko.

a. Teritoria dividiĝo de la Ciganaro


La regiona situo de la cigana loĝantaro tre grave diferencas de la landa. Dum malpli ol 10% de kiu ajn grupo de la Ciganaro loĝas en la ĉefurbo, kontraŭ la landa 20%-a loĝantaro, ĝis tiam en vilaĝoj loĝas la 58-64% de la Ciganaro, kontraŭ la landa 38%. (Habicsek 1999) La teritoria situo de la hungarlandaj tri ciganaj grupoj (beaŝa, vlah-cigana, romungro) troveblas laŭ sufiĉe sen-egala divido. La granda plimulto de la Beaŝaj-ciganoj loĝas en la sudaj departementoj Transdanubiaj; en tiu regiono ilia proporcio proksimumiĝas al la 30 %-oj de la tuta Cigana loĝantaro, sed en la du departementoj de la

regionoj Baranya kaj Somogy ili faras la plimulton de la Ciganoj. En aliaj regionoj la beaŝe parolantaj Ciganoj troviĝas nur bagatel-nombre.

La divido de parolantoj de lingvoj Hungara kaj Romani, estas pli egala. Pli egale dividiĝas la mezuro de parolantoj de lingvoj Hungara kaj Romani. La Ciganoj Hungaraj gepatraj lingvaj, sumas la tri kvaronon de la Ciganoj en la plej multaj regionoj; sole en la regiono Suda-Transdanubio malkreskas ilia nombro malsupren de 50%. La proporcio de parolantoj de dialektoj de la lingvo Romani estas 20-25% en ĉiu regiono.

Pli egale dividiĝas la mezuro de parolantoj de lingvoj Hungara kaj Romani. La Ciganoj kun Hungara gepatra lingvo, sumas la tri kvaronon de la Ciganoj en la plej multaj regionoj; sole en la regiono Suda-Transdanubio malleviĝas ilia nombro sub la 50%-jn. La proporcio de parolantoj de dialektoj de la lingvo Romani estas 20-25% en ĉiu regiono.

La sekva mapo montras lande la nombro-proporciojn de la Ciganoj



1. *numera ilustraĵo: La teritoria dividiĝo de Ciganoj en Hungario*

2. **PRI LA HUNGARLANDAJ BEAŜOJ**

3. **2.1. Ilia pasinto**

4. La deveno-historio de Beaŝoj estas la plej malmulte konata en Hungario kontraŭ la aliaj du ciganaj grupoj: la Romungroj kaj Vlah-ciganoj. La unua skriba mencio de Ciganoj okazis sur teritorio de Rumanio en 1385, sed ĝi ne mencias malsamajn Cigano-grupojn. La rumana histori-verkado mencias pri tio, ke ili alvenis kun la 1241. jara mongola invado, sed koncerne ilian lingvon, priskriboj ne ekzistas (Iorga, 1930:22). Temas pri tre escepta historia procezo, en kio estas ankoraŭ multe da nekonataj elementoj, tiel ni ne havas aŭtentikajn fidindajn dokumentojn pri tio, kiam, kiel inter kiuj cirkonstancoj okazis la lingvoŝanĝo de Beaŝoj. Ankaŭ pluraj fontoj skribas pri tio, ke ĉ. je fino de la 17a kaj komence de la 18. jarcento migris ili al iliaj nunaj loĝlokoj. (Saramandu, 1997:97)

5. Laŭ la sociologiaj analizoj en la finaj jaroj de la 20-a jarcento la granda parto de Beŝoj inter 1893 kaj 1918 translokiĝis al Hungario, sed la enmigrado daŭris inter la du mondmilitoj, eĉ ankoraŭ en la sekvaj jaroj post la dua mondmilito. (Sisák, 2001: 284)
6. La „Magyar Agora” estas publikareo kaj popolkunvenejo Hungara de la 21a jarcento kie ĉiuj povas konigi opinion antaŭ la publiko pri la oficialaj aferoj kaj ĉiu povas konfronti pri la temoj pensoj elformiĝantaj de aliuloj. La unua tia semajnofino disputa pri la Hungaria Ciganaro, okazis inter la 16-18a de Septembro 2005a, kies programoj kaj aneksaj-materialoj atingeblaj estas ĉe la retpaĝo <http://www.magyaragora.hu/>

7. 1.2 Ilia kulturo

8. Pluraj konceptoj kontraŭdirantaj unu al la alia ekzistas aŭ kompletigaj unu la alian koncerne ilian kulturon. Laŭ iu tre karaktera koncepto, la kulturo de la hungaria Ciganaro estas popola kulturo, kiu unuavice limigas sin al la parolo kaj ne la skribo. Ĉi kulturo estas rigardebla parte manka- kaj parte malriĉeca kulturo, kiu estas ankoraŭ nun ĉe la stato antaŭanta la kulturan unuiĝon. (Szuhay, 1999:13).
9. Laŭ la vidpunkto de tio deflankiĝa: la Ciganaro estas tia etna ekzisto, kies kulturaj proprecoj akre diferencas de sia medio. Laŭ aliaj opinioj ĵus la akomodigoj al la ĉiamaj cirkonstancoj estas la proprecoj de ĉi kulturo. (Fraser, 1996, Liégeois, 2002).
10. Kvankam en ĉiuj konceptoj mi povas malkovri verecon, laŭ mia opinio koncerne la kulturon de la Ciganaro unusence ni ne povas nomi „pure Cigana” aŭ nur „malriĉeca kulturo”, ja kunvivante kun la majoritata socio, inter la malsamaj kulturoj la intermiksiĝo, natura asimilado ne eviteblas. Post paso de certa tempo, per miksiĝo de kulturoj, aŭ per antaŭeniĝo de la dominantaj kulturo kaj lingvo, la malplimulto iom post iom perdas tiujn trajtojn, kiuj apartigas sin de la majoritata socio. La plej bonaj ekzemploj de la asimilado estas: la miksaj geedziĝoj, en kiuj la infanoj laŭorde transportas proprecojn de la dominantaj kulturo. Apud tiuj gravas noti, ke ankaŭ la Beŝoj – kiel ĉiuj grupoj en etna stato – transprenis, ellernis multajn kondutojn sintenojn aferojn agojn objekto-uzojn el la kulturo, kutim-sistemo, viv-maniero de la majoritata socio, sed ankoraŭ nun ili gardas ankaŭ tiujn proprajojn, kiuj apartigas ilin de membroj de la majoritata socio.
11. Laŭ ilia profesio oni nomas la Beŝajn ciganojn ankaŭ „Trogo-kavigaj Ciganoj”. Trogo-kavigantoj vivas krom nia patrujo ankaŭ sur teritorioj de Bulgario, Kroatio kaj Serbio, sed krom ili ĉi metion aliuloj ne praktikis. (Nuntempe la plastaj varoj preskaŭ tute forigis la ligno potojn de la kamparanaj etbienoj.)
12. Ankaŭ ilia lingvo diferencas de la aliaj Ciganoj, ankaŭ ni patruje ili parolas la arkaikan rumanan dialekton, kiel ankaŭ la Beŝoj de la ĉirkaŭaj landoj. Ili malofte kontaktiĝas kun aliaj grupoj de la Ciganaro, kun tiuj ne geedziĝas – kvankam estas jam ekzemplo ankaŭ je ĝia kontraŭo-, ili ne vivas en komuna kolonio kun tiuj. Koncerne ilian kulturon oni apenaŭ povas trovi elementojn kiuj troveblas ankaŭ ĉe

alia Cigana grupo. Iuj esploristoj pridubas ankaŭ ilian Cigano originon, kaj opinias malkovri en ili iun rumanan popolfragmenton. (Filipescu, 1906, Block, 1936, Chelcea, 1944).

I.2.1. Ilia lingva situacio

Baze de la ĝis nunaj dialektologiaj esploroj la Beaŝoj” provizoran dialekton parolas.” Tiu ĉi rumana dialekto gardas proprecojn de la dialektoj parolataj sur la sud-orienta teritorio de riveroj Kőrös, sur la parto situanta al la nord-orientaj limoj de la regiono Banato kaj sur teritorioj de sud-okcidentaj limoj de Transilvanio. (Saramandu,1997:7) „Grava demando estas rilate la rumanajn dialektojn de la Beaŝoj, kial parolas la Beaŝoj rumane? Supozeble la respondo ni devas serĉi en tio, ke la Beaŝaj komunumoj suferis lingvoŝanĝon vivante sur certaj partoj de Transilvanio, sur teritorio de riveroj Kőrös kaj la historia regiono de la Banato. Nome, ili transiĝis pri uzo de sia kutima lingvo al uzo de lingvo de ĉirkaŭanta komunumo de la Rumanoj. Tiun saman lingvan procezon travivas nun grava parto de la hungariaj etnoj.” (Borbély, 2001: 80)

La lingvo-variante parolata de la Hungariaj Beaŝoj - simile al la rumana dialekto – kiun la sampatrujaj Beaŝoj kalkulas kiel memstaran lingvon – havas tri dialektojn: Argyelan [ardjelan], Muncsán [munĉan], Ticsán [tiĉan]. El inter tiuj la "Ardjelan" estas la pleje disvastiĝanta, kiu estas dialekto antaŭ-lingvo-reforma rumana de Banato, kaj de la rumana nacia lingvo preskaŭ izolate ĝi gardas ankaŭ nun sian arkaikan trajton. La "Ardjelanoj" uzas ĉi lingvan varianton en departementoj: Somogy, Tolna, Zala, Baranya [ŝomodj, tolna, zala, baranja], sed kelkaj familioj vivas ankaŭ en la departementoj Veszprém[vesprem] kaj Vaŝ. En la Suda-Transdanubio en Alsószentmárton [Alŝosentmarton] kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo oni parolas la tiel nomatan dialekton "Munĉan", en kiu – pro proksimo de la landlimo – troveblas multaj slav-devenaj vortoj. Tiu ĉi dialekto – simile al la tria lingvogrupo "Tiĉan", vivanta sur la orienta parto de nia patrujo en departemento Szatmár-Bereg - multe plie prenas el la nuna rumana lingvo. Inter la "Ardjelanoj" kaj "Tiĉanoj" la vorto Beaŝ-, uzatas nomi la popolon kaj lingvon, sed en rondo de la Munĉanoj: parolantaj la trian hungarian dialekton de la Hungariaj Beaŝoj, ne nomas sin Beaŝ-oj, sed por noti ilian grupon kaj lingvon ili uzas la vorton Cigano. (Kovalcsik,1993:231, Szalai,1997a:104)

Ilia lingvo – verŝajne – de la komenco estis en stato de la **diglosio** (do; stato de dulingveco, duobla aŭ diferenca lingvo, duobla parolo), ja vivante kun la majoritata socio, la interpreta lingvo, kiel en la pasinto, tiel ankaŭ nuntempe estas la Hungara. La „malvasta diglosio” de iu lingvo – komentariita de Ferguson – etendiĝas al du aŭ pli da variantoj de iu lingvo. Kaze de la lingvo Beaŝ, tiu signifas ĝiajn „ordinarajn” variantojn kaj iun alian, „noblan”, gramatike pli komplikan rilaton inter la rumana literatura lingvo alproprigita dum la lerneja instruo. Sed inter tiuj du variantoj ne estas kontaktoj niatage, la lingvouzo ne funkcias, tiel ni ne povas paroli pri la klasika diglosio. Laŭ la pli novaj diglosiaj substantivaj epitetoj ankaŭ en kazo de la dulingveco ni povas paroli pri diglosio. La dulingveco signifas tion, ke membroj de la komunumo estas posedantoj de ia dulingva kodo, la diglosio signifas tion; ke roloj de la du lingvoj radikale estas malsamaj en la lingva ekzerco de la komunumo; do ĝia fundamenta propreco estas, ke la du lingvoj en vivo de membroj de komunumo kune plenumas tiun rolon, kiun plenumas kaze de la unulingveco la variantoj intimaj aŭ pli oficialaj. (Réger,2002)

2.3.1. La priskribo de la lingvo Beaŝa

Koncerne la etimologion de la vorto „Beaŝ” ekzistas du speciaj supozoj. Laŭ la pli frua (Papp 1982) la vorto signifas: „ministro”, kio devenas de la rumana idioma vorto 'băiaș', kaj aludas ankaŭ en la pasinto faritaj oro-lavan kaj erco-ministajn agadojn de

la Beaŝoj. Tiun aserton pravas ankaŭ en la vortaro rumana sub la artikolo 'băias' trovebla signifo, kiu troveblas en la sekvaj figuroj: **băiáš (băiéş), băiáşi, băiéşi, s.m. (reg.) 1. miner 2. țigan lingurar, zlătar.**

(La rumanaj signifoj de la vorto „Beaŝ-” estas troveblaj laŭ la DEX (Dicționarul Explicativ al Limbii Române) 1996. Ediția a II-a, Academia Română, Institutul de Lingvistică „Iorgu Iordan”, București: Univers Enciclopedic, kio atingeblas ĉe la paĝo <http://dexonline.ro/search.php?cuv=baias>)

Laŭ la dua supozo (Tálos, 2002:321) la vorton „Beaŝ” oni povas rilatigi al signifo de la „trogo-faro”, ja tiu ĉi popolgrupo je sia alveno al Hungarujo, okupiĝis per kavigadoj de trogoj, pretigoj de ligno-kuleroj kaj ceteraj dommastrumaj objektoj el ligno. Kvankam ambaŭ supozoj enhavas pruveblajn asertojn, ni devas scii, ke nuntempe la pli multo de la Beaŝoj komprenas sub la vorto 'bájás' [beajaŝ] jam nur unu grupon de la Hungariaj Ciganoj, la Beaŝ-devenan viron aŭ ties pluralon uzante mem la popolgrupon. (**bájás, bájás h fn 1. Beaŝa homo, viro; om dă ~ Beaŝa homo; lyimbă dă ~ Beaŝa lingvo 2. nomo de la Beaŝa popolgrupo, ~ságyé áisj [šadje aiŝ] – ĉi tie Beaŝoj loĝas. Orsós, 1997b:17**). Ne estas duba, ke bazo de lingvo de la komunumo difinanta sin Beaŝ-oj, estas la Rumana lingvo de Banato, kvankam la Rumanan lingvon kaj la vivantojn sur la rumana lingvo-teritorio ekde multaj jardekoj ĝi tute ne kontaktas, la lingva evoluo de la du komunumoj unu de alia izolite okazas. Lingvo de Beaŝ-oj ĝis la 1980-aj jaroj vivis nur en parola varianto, vera komenco de ĝia skribo estas metebila al komenco de la 1990aj jaroj, kaj ĝi ligiĝas al la organizaj laboroj de la instituto unika en la mondo; la Gimnazio Gandhi de urbo Pécs.

Priskribon de lingvo de la Hungariaj Beaŝoj, komence de la 1990aj jaroj, unue Julio Papp provis bazante ĝin sur liaj kolektaĵoj en Peĉ kaj en ĉirkaŭaĵo de Peĉ. Lia verkaro estas ege grava stacio en komenco de la Beaŝa skribo, sed lia priskribo de la Beaŝa lingvo ne signifis trarompon - komencon de ties daŭrigo - en historio de la lingvo. Lia lingvo-priskriban esploron la membroj de la lingvo-komunumo malpli sentis sia, ankaŭ per tio ĉi estas klarigebla, ke ĝi ne aklimatiĝis, kaj ĉar ĝi estiĝis konata nur en tre malvasta rondo. Julio Papp fundis la priskribon de la lingvo Beaŝa al unusola datumkoniganto (vito-laboristo) al lia propra lingvouzo. Pere de la datumon koniganto ne konatajn kaj ankaŭ nek de la lingva komunumo uzitajn vortojn li pensis barilo de la datum-koniganto, kaj sen atento lasante la diglosan situon de la lingvo Beaŝa, li transprenis el la rumana lingvo la mankantajn vortojn. Ĉar li ne indikis la transprenojn, oni ne povis decidi, ke la vortoj rolantaj en la vortokolektaĵo kiome realas, ĉu enhavas ili la vortostokon uzitan de la Hungariaj Beaŝoj. Plian zorgon signifis, ke je la priskribo de Beaŝa lingvo la de li uzita transskriba sistemo restis fremda por la cel-publiko ne disponanta pri la lingvaj konoj, ĝi pruviĝis nefidinda fonto. Kontraŭ ĉio ĉi, verkaro de Julio Papp en rekono de bezonateco al priskribo de la lingvo, en ties komenco estis pionir-trajta, ties signifo estas nekontestebla. Ne nur el la vidpunkto lingva sed ankaŭ el instru-politika estas konsiderinda la komenco de la 1990-aj jaroj, kiam malgrandnombra intelektulara grupo komencis organizon de Cigan-nacia gimnazio. Dum la laboroj evidentiĝis, ke al instru de Beaŝa lingvo, eĉ la minimumaj kondiĉoj mankas – ja de la lingvo – kontraŭ provo de Julio Papp – ne elformiĝis ĝis skribo, la kono-portantoj: la lernolibroj al instruoj de la Beaŝa lingvo kaj kulturo. Ankaŭ al ilia verko neforlaseble necesis, la kreo de skribo de la lingvo Beaŝa. Apud la organizaj laboroj de la gimnazio, ekiris etnografiaj esploraj laboroj, en la setlejoj loĝitaj de Beaŝoj sur teritorioj de la Ormánsag (Ormanŝa: g estas region-unuo malgrand-vilaĝa en departemento Baranya laŭ la rivero Dráva, ĝi estas malgranda parto de la Drava-ebeno), dum kiuj apud kolektadoj de popolkantoj kaj popolfabeloj komenciĝis kolektoj ankaŭ de Beaŝ-lingvaj korpusoj (vortosignifoj). Ĉefe dum la etnografiaj kolektaj laboroj ligiĝantaj al nomoj de Katarina Kovalčík kaj Anna Orsós

antaŭeniĝis la rango de la priskribo. Tiam estiĝis neeviteble necesa la prilaboro de unueca skribmaniero. La unuaj Beaŝaj kolektaĵoj popolkantoj kaj popolfabeloj estis fiksitaj laŭ reguloj de la hungara ortografio, kiuj enhavas detalan uz-instrukcion al la elparolo de la publikigitaj tekstoj. En la 1994a jaro aperantaj unuaj eldonaĵoj signifis la efektivan komencon de skribo de la lingvo Beaŝa. Ĉi tiujn baldaŭ sekvis la lingvolibro Beaŝa, kiu ekprovis sistemigi - kiel unua - la ĝis tiam nur parolon konsistigantan lingvon Beaŝa. Al nuntempo la lingvolibro kompletigis per vortaroj Beaŝa-Hungara kaj Hungara-Beaŝa, kaj tiun ĉi priskribon sekvante naskiĝis pliaj kolektaĵoj de kantoj-kaj popolfabeloj.

Graveco de ĉi laboroj estas nekontestebla eĉ ankaŭ tiam, se ili kreiĝis per ne tute lingvistika konscio. Sed la pasinta jardeko pruvis la temporeziston de tiu ĉi skribmaniero, ja la komencajn etnografiajn volumojn sekvis multaj similaj kaj aliaj fizionomioj de lingvikaj verkoj. Ĉi skribmaniero ŝajnas esti akceptebla ne nur por la plej granda parto de la Beaŝa-intelektularo, sed ankaŭ por la plimulto de la nur skribilegi sciantuloj. De aŭtuno de 2002, inter kadroj de Lingvistika Instituto de la Hungara Scienca Akademio funkcia Cigan-lingva Esplora Grupo oni celis krei daŭrigejn de priskriba-lingvistika, antropologia-lingvistika, socio-lingvistika kaj kontaktologia esploroj koncernaj la lingvon Romani, kiuj per la multvidpunkta priskribo de la ĝis nun apenaŭ esploritaj lingvoj Beaŝaj kaj Romani samtempe povas signifi gravan sciencan aliĝon al la ĝisnunaj rezultoj de la supraj partaj disciplinoj. En la Lingvistika Instituto de la Hungara Scienca Akademio dum printempo de 2009, pretiĝis la Priskriba Gramatiko de Beaŝa Lingvo, rezulte de komuna laboro de s-ino Anna Orsós-Pálmai kaj Ladislao (László) Kálmán. (Oršo:ŝ - Kálmán, 2009)

3.EDUKPOLITIKA SITUACIO

La priskribo, lingva planado, elformigo de Beaŝa lingvo okazas ankaŭ en niaj tagoj. Decida elemento de politiko de la Hungara Respubliko koncerne la etnajn minoritatojn - krom la Konstitucio - pri rajtoj de la naciaj kaj etnaj malplimultoj, la amendita 1993. jara (LXXVII:) 77-a leĝo (en la sekvoj la minoritata leĝo) kiu, - krom iliaj ceteraj rajtoj - decidas pri ankaŭ la lingvaj rajtoj de la minoritataj komunumoj. En la enkonduka parto de la minoritata leĝo la sekva konceptado rolas:” *Lingvo, kulturoj objekta kaj spirita, historiaj tradicioj de la hungar-civitanecaj naciaj kaj etnaj minoritatoj vivantaj sur teritorio de la Hungara Respubliko, tiel ankaŭ iliaj aliaj proprecoj koheraj kun ilia malplimulta esto, estas partoj de ilia individua kaj komunuma mem-identeco. Ĉiuj ĉi estas specialaj valoroj: ilia konservo, flego kaj plimultigo estas la primara rajto ne nur de naciaj kaj etnaj minoritatoj, sed ankaŭ intereso de la hungara popolo, lastavice de komunumo de ŝtatoj, nacioj.*” De la leĝo certigita subjekto de la lingvaj rajtoj, do - konvene al la supra difino - estas la personoj kaj komunumoj apartenantaj al la patrujaj minoritatoj.

La ciganaro kvankam – simile al la pliaj malplimultoj – principe disponas pri samrajto, similajn pretendojn preneblas al konservo de sia gepatra lingvo, aŭ por partopreni en la eduko, instruo okazanta en sia gepatra lingvo. Kontraŭ tio konstateblas, ke kaze de la Ciganaj lingvoj baze mankas kondiĉoj personaj kaj objektaj de la gepatra lingva instruado. Tiel do la Ciganaj lingvoj pli bona kaze povas esti nur objektoj de la instruo, sed ĝiaj iloj neniel. La restriktio de la gepatra lingva instruo elmontriĝas egale je niveloj de la edukadoj bazaj-, mezaj- kaj superaj. Tio signifas kaze de ĉi lingvoj plian subalterneco, ke ankoraŭ la gepatran lingvon parolantoj pensas tiel, ke uzvaloro de ilia lingvo estas malpliiganta. En rondo de la patrujaj Ciganoj estas malmultnombraj tiuj instruistoj kiuj scias la lingvojn: Cigana aŭ Beaŝ-a, ne estas eduko de lingvo-instruista fako pri tiuj lingvoj, kaj mankas la lernolibroj, vortaroj kaj

aliaj studmaterialoj. Laŭ la eŭropaj pretendoj la pretigo de konvenaj studmaterialoj estas tasko ŝtata. (Proponoj de Hago, 1996: ?)

3.1. La laŭjura fono de instruo de la Ciganaj lingvoj

Bazo de instruo de la malplimulto estas la (2) numera alineo de la 68a § de la Konstitucio, kiu certigas la instruon gepatro-lingvan por la naciaj kaj malplimultaj etnoj. Dum tio, sekve akcepton de la leĝo minoritata, por la cigana malplimulto unue malfermiĝis ŝanco por tio, ke eksplodante el la alproksimigo de iliaj instruaj problemoj nurnure interrilataj kun sociaj malavantaĝoj, simile al la pluraj naciaj minoritatoj, ili povu pretendi ankaŭ la organizon de instruo de la Cigana minoritato.

La instruo de Ciganaj gelernantoj ne havas unuagrade memstaran minoritatan institucion-sistemon. Mezgrade ekzistas nur kelkaj ciganaj institucioj instruantaj laŭ minoritata programo (ekzemple la de ŝtato-fondita Gimnazio kaj Internulejo Gandhi de Pécs), en kiuj la instruo de Ciganaj lingvoj realiĝas. Kontraŭ tio, multaj ciganaj klasoj kaj grupoj funkcias apartigite en la instruaj institucioj.

Unu el la plej gravaj dokumentoj de instruo de la minoritataj lingvoj, estas la direktivo de la infanĝardena eduko de la nacia etna malplimulto kaj la eldonita 32/1997. (5.nov.) MKM. edikto parolanta pri la lerneja instruo de la nacia, etna minoritato. La kadra instruprogramejo pri la nacia, etna malplimulto pridecidas en ĉiu studjaro; la postulatojn de la patrino lingvo (lingvo de la malplimulto) kaj literaturo, kaj sciaro pri la popolo, ĝis fino de la 12a studjaro. Je la laŭ studjaraj dividoj de postuloj, la kadraj instruplanoj povas esti malsamaj ĉe - per la plurfoje modifita edikto la 32/1997. (5.nov.) MKM. (MKM estas mallongigo de la nomo Hungara Publika Kulturo Ministerio) - emisiitaj tiuj ordonoj pri principo de lerneja instruo de nacia, etna minoritato parolanta pri la emisio de principo de la infanĝardena eduko kaj lerneja instruo de la nacia, etna minoritato, kiuj pridecidas la plenumon de la postulatoj je finoj de la studjaroj kvara sesa oka kaj la dek dua.

Sed kaze de la Ciganaj lingvoj nek la lingva sistemo pri postuloj, nek la kadraj instruprogramejoj staris je dispono por la institucioj dezirantaj instrui la lingvon. Pli frue ankaŭ pluraj fakspertuloj kaj minoritata publika arbitraciisto kritikis la nom-donon „samniveleja instruo de Ciganoj”, ĉar ĝi determinis la ciganojn kiel komunumon postresta kaj igenda al samnivele. La kleriga Ministerio en sia edikto 13/1999 (III.8.) OM – apud la senŝanĝo de enhavo de la regulado – donis novan nomon al la instruformo; Instruo Cigan-minoritata.

(Eŭgeno Kaltenbach: Raporto pri agado de la Parlamenta Komisiito de la Rajtoj Naciaj kaj Etnaj Minoritatoj. 1. Januaro 1999.-31. Decembro 1999. Budapeŝto, 2000)

La cigan-minoritata instruprogramejo devis enhavi du elementojn: unuparte la disvolvon de la memkono cigan-minoritata, la kulturen edukon, aliparte – malsimile de la nacieca eduko - celanta la malmultigon de la unuopaj malavantaĝoj, la evoluigojn socializadajn, komunikadajn kaj studobjektajn, talento-flegadojn. La cigan-minoritata programejo kontraŭ ĝia nomŝanĝo enhavas ankaŭ plue samniveleajn elementojn krom la nacieca instruo. La regulado sugestas tion, ke ĉiuj ciganaj infanoj bezonas la evoluigon, do ili estas plie subevoluintaj ol la pliaj infanoj. Nome la instruo cigan-minoritata – ankaŭ post la depreno de la vorto „samniveleja” el la nomo – la aprezan prijuĝon de la primitiveco - ligas al la cigana/roma identeco. Nekontestebla estas, ke la samnivelejo ĉe kelkaj individuoj povas esti utila kaj necesa, sed ties preskribo ofenda estas por la tuta popolgrupo, eĉ se ĝi ankaŭ okazas en kadro de iu elektebla instrua formo. Unuavice tiam, se ni pensas pri tio, ke la cigan-minoritatan instruon pretendantaj familioj aŭtomate ricevis la servon „al ilia samnivelejo”, ja sen tio ili ne rajtis partopreni en la okupiĝoj por servi gardon de sia identeco. La situacio ne estis sama kaze de la aliaj hungariaj malplimultoj.

La cigan-minoritata eduko-instruo certigas – laŭ aparta programo – por la infanoj, kaj gelernantoj apartenantaj al la cigan-minoritato, apud la kultura kaj laŭ pretendaj patrinlingvaj eduko kaj instruo, la ŝanco-egalecon kaj la talento-flegadon. Do la ellerno de ciganaj lingvoj ne estas deviga elemento de ĉi programo, sed pretendoj de la gepatroj – baze de la skribaj iniciatoj aŭ konsento de ok gepatroj – certigas la instruon de la de ili parolata vario, kvankam al tio nek la fakaj kaj personaj kondiĉoj (lingvaj postulato-sistemoj, kadraj studprogramoj, klerigo-eduko pri lingvoinstruistoj) ankoraŭ nun ne staras je dispono. La „miksiĝo” de programoj naciminoritataj kaj samniveligaj en la instruado de cigan-minoritato unupartite povas fortigi kaj fortigis la segregacian instruon de la cigana malplimulto, legitimeblas/legitimis la ekzistan-rajton de la alie ne nacieco-karakteraj, apartiĝinta malaltnivelaj instruformoj, plihardeblas/fiksitis la antaŭjuĝan vidmanieron kontraŭ la ciganaj infanoj. Aliparte la instruo cigan-nacieca estas malhelpanto de elformiĝo de la institut-sistemo baziĝanta sur realaj pretendoj.

Pri la mezdistance efika agado-pako celanta al plibonigo de viv-cirkonstancoj de la Ciganoj kaj korektigo de ilia socia situo parolanta 1073/2001.(13. julio.) numera Registara decido (pri modifo de la 1047/1999.(5.majo) Registara decido) aparte okupiĝas pri instruo de la cigana minoritato, kaj deklaras, ke la leĝo minoritata aŭ publiko-kleriga, kaj la ellevitaj taskoj dum la modifo de cetera valida juro estas: ”la enhava evoluigo de la cigan-minoritata instruo, la prilaboro de la kadraj instruprogramoj, la kreo de kondiĉoj de la taksado kaj kvalito-certigado, la certigado de instruiloj, la certigoj de metodikaj helpantoj, helpiloj, la prilaborado de la postuloj necesa al instruado de la ciganaj lingvoj, dependante de okazo de akordigo kun la Landa Cigana Sin-administrado.” La prilaborado de tiu ĉi sistemo pri postuloj komenciĝis en 1999, kaj nur en 2009 konsentis la Kleriga Ministerio kun legitimado de ĉi laboro.

(Kor: A. P)

- Ni daŭrigos -

Promeno en Hatvan

„Ne tiu estas malbono se vi ne scias ion, sed tio, se vi ne demandas, ne interesiĝas, ne serĉas la eblon informiĝi pri tio” opiniis kaj opinias ankaŭ nuntage la pensadantoj. La legado, interparoladoj, vizitado de lokoj krom retaj informoj ankaŭ dum niaj tagoj estas bonaj okazoj je akiroj de la scio. Deponejoj de scioj estas la bibliotekoj, muzeoj, galerioj. Inda estas viziti ilin, ja en niaj troe plenigitaj tagoj en nia tempo, ĉar ili donas ŝancojn por refreŝiĝi.

En la pasinta jaro kune kun mia edzo mi vizitis tiujn lokojn de nia regiono (Norda Hungarujo), kiujn ĝenerale ni nur travojaĝis sed neniam vizitis. Unue mi informiĝis pri ilia malnovtempa historio. Poste el la vikipedio pri la nuntempaj vidindaĵoj de tiuj nekonataj setlejoj apud la fervojlinio inter Miskolc kaj Budapeŝto. Poste elektis el la pluraj lokoj kaj unu post la alia ni vizitis ilin. Ĝis nun mi ne informis pri urbo Hatvan, pri la fervoja kruciĝejo. Nun mi agas tiel tial, ke mi faru emon al vi por fari someran ekskurson en tiun ĉarman urbeton. Akiru ankaŭ vi gajajn rememorojn por vi mem kaj por la familianoj. Pri la plej gravaj indikoj de la urbeto vi trovos ĉion ĉe:

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Hatvan>

Post la forlaso de konstruaĵo de fervoja stacidomo de Hatvan promenante ni baldaŭ atingis la bele konstruitan modernan stacion de aŭtobusa trafiko. Poste ni trairis ponton de rivero Zagyva [Zadjva], kiu estas la dekstra flankrivero de Tiso en Hungario kaj estas 179 km longa. Tiutempe pro la sekeco ĝi havis nemultan akvon. Maldekstre ni preteris la iaman konstruaĵon de fabriko "Matro-Sukero" kaj post kelkaj paŝaj rigardadoj ni estis jam en la intimetosa interna urbo. Reen promenante sur la Zagyva-ponto ni konsideradis

dum la sunsubiro, ĉu la cikonio - enakvo staranta - havos sukcesan rano kaptadon aŭ ĉu ne? Kontraŭflanke ni povis rigardi la plej altan pinton: Kékestető de montaro Matro (alto 1014 metroj). Alveninte ni vidis en la enurbo la maldekstre starantan eksan kastelon - havanta iam pli belan tempon - de nobela familio Grassalkovics [graŝŝalkoviĉ], sed nun ruiniĝinta ene. La urbanoj rakontis, ke oni komencos ties renovigon en 2012, kaj se ĝi pretos, ricevos lokon tie ankaŭ la muzeo Hatvani, kies bela artobjekta konstruaĵo nun estas damaĝita de ebla kunfalo, ja la urbo ne havas sufiĉe da mono por rekonstrui ankaŭ ĝin. La mezon de tiu bela placo zonita per florbedoj, okupas el nigra marmoro konstruita grandioza monumento de sovetaj herooj mortintaj en areo de urbo Hatvan, kiam ili liberigis tion kontraŭ armeoj de faŝistoj. La monumento estas ornamita per la insigno falĉileto-kun martelo. Vidante ni surpriziĝis, ĉar en nia regiono oni ne lasis enurbe tiun monumenton sed portis en la tombejon de herooj. Sed en ĉi urbo la monumento restis sur la parko randite per ombro-donaj arboj, ĝenante neniun, ja la monumento apartenas al historio de la urbo. Konstante ni vidis tiun gardon de historia memoro. Transa flanko de la placo staras la biblioteko nomita pri la hungara poeto Endre (Andreo) Ady. La biblioteko estas interne tute kovrita per lignotavoloj, kaj jam ĉe la enirejo akceptas vizitanton la el ligno preparita memorejo pri Ady (Adi). Kontraŭe troveblas la ĉarma infana biblioteko kun la donace ricevitaj pupteatraj figuroj de la Pupteatro „Harlekin” el urbo Eger kaj la „koboldaj domoj”. 30 miloj da infanlibro-volumoj atendas siajn 8 mil legantojn kaj ĝuigas ankaŭ ĉiujn aliajn enirantajn interesantojn. Sur la etaĝoj unua, dua, tria situas la bibliotekoj por studentoj, plenkreskuloj kaj la diversaj ekspozicioj de pentraĵoj, ceramikaĵoj, desegnaĵoj kaj aliaj objektoj, per kiuj la biblioteko helpas al Muzeo Hatvani, suferanta pro manko de la bezonata libera loko. Krom tio en la urbo funkcias ankaŭ alia galerio, sed ĝi prezentas ĉefe nur modernajn pentroartajn bildojn de artistoj vivantaj en Hatvan. De la malnova urbo situas je 3 kilometra distanco moderna, nova parto de Hatvan, kunligite per tio de la malnova per aŭtobusa trafiko. Tie, apud la tradiciaj familiaj domoj estas troveblaj ankaŭ tielnomataj bloko-domoj faritaj per elementoj domfabrikaj. Sed ankaŭ tiun teritorion karakterizas la ĉiamverdaj kreskaĵoj kaj aro de multkoloraj florbedoj plezurigaj okulojn. En ambaŭ urbopartoj al la agrabla vidaĵo aldoniĝas la skulptaĵoj kaj preĝejoj. Eĉ la gastronomiajn delikataĵojn ni povas trovi inter la regaloj de menukartoj de restoracioj, kafejoj, sukeraĵejoj kaj bakejoj de la itala pasto "pizza". la tempo rapide forflugas kaj la turisto povas returni sin al sia hejmo kun multaj riĉaj agrablaj travivaĵoj post la pasigita somera tago en Hatvan.



Hatvan – Biblioteko Ady Endre (Foto: s-ino Pásztor)

Promenadi en urbon Hatvan, invitis s-ino Adri Pásztor

Pásztor Lászlóné

Ĝustigo de ŝerco

En nia marta numera gazeto ĉe unu ŝerco misskribo okazis. La ŝercon vidu nun ĝuste:

Karega mia!

Karega mia, ĉu vi deziras jaguar-tipan aŭtomobilon donace al via naskiĝtago?

Ne.

Ĉu ebla estas, ke vi ŝatus mantelon el pelto de vizono?

Mi dankas, sed ne.

Ĉu vi ĝojus por kolringo el diamantoj?

Ne. Mi ŝatus divorci.

Ho, tiom grandan elspezon mi ne planis!

La korekton faris s-ino Adri Pásztor



Ne ŝerco estas

Oni asertas, ke la evento vere okazis kaj estas notita inter radio-dissendaj dokumentoj de la amerika milita-naŭtiko:

- Tuj flankeniru 15 gradojn al Nordo! – venis la ordono de la proksimiĝanta ŝipo.
 - Mi proponas, Vi flankeniru 15 gradojn al Sudo! – sekvis la respondo.
 - Mi rediras, flankeniru 15 gradojn al Nordo, se ne, ni karambolos!
 - Mi ne povas flankeniri! Preteriru Vi 15 gradojn...
 - Mi estas oficiro de la amerika milita naŭtiko, kapitano de unu ŝipo de amerika floto.
- Lastfoje mi diras, preteriru!
- Mi ne povas, mi estas servisto en la lumturo...

(Esperantigis Adri Pásztor)

Leterkesto

Plej Bela Rozo de la Mondo - Hans Christian Andersen

„Karaj samideanoj! Ni invitas vin koni la MP3 sondosieron de Fabelo de Andersen titolita "Plej Bela Rozo de la Mondo" kun voĉoj de Flávio Fonseca, Cristina Pancieri kaj Clara Pancieri. Jen la ligilo por senpaga elŝuto:

<http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/plej-bela-rozo-de-la-mondo/>

Oni povas libere kopii kaj disdoni la sondosieron! Kore Salutojn, Portal Kunlaboro

kunlaboro@kunlaboro.pro.br „/Plusendita de Aloisio Sartorato, Brazilo/

Opinioj pri retrevuo NHI-Marto 2012a

„Estimata

Adri

Unue, mi dankas pri la reta revuo ĝenerale. Aparte mi ŝatas la temon klimatsanĝo.

Vi traktis ĝin popol-science (do komprenebla por mi)

kaj samtempe el pluraj vidpunktoj, kompilante opinion de diversaj fakuloj. Tio donas al la artikolo kredindecon.... *Bert Schuman el la franca kastelo*”

„Estimataj esperantistoj geedzoj Pásztor!

Mi skribas por danki la legeblecon de la revuo de vi eldonita. Bona nivelo de kulturaj informoj kaj esperanta literaturo..... do multan dankon pro via laboro. Mi konas la belan Hungarion de plurfojaj vojaĝoj, kaj ne nur la nordon, aŭ nur la ĉefurbon, sed ankaŭ Balaton- regionon. *El tropika varma Brazilo, Clovis Portes*”(2. marto 2012)

Danko pro aperigo de recenzo

„Kara sinjorino Adrienne Pásztor! Plezure mi Vin sciigas, ke aperis via dankinda recenzo pri la libro *Meditadoj el la Animo en LBV-retejo*. ... Vi atingos ĝin per la jena ligilo: <http://www.boavontade.com/inc/interno.php?cm=94234&cs=130&ci=6> ... Vin tutkore salutas Maria Aparecida www.tbv.com.br/esperanto”


Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj

de sabato, 11-a ĝis lundo, 20-a de aŭgusto 2012 Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kurso

Plie ĉe: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique32&lang=eo> (29-02-2012, *Bert Schuman*)

Novaj libroj!


/a/ Nova esperantlingva libro, tradukaĵo estas aĉetebla ĉe HEA. La historian romanon de **Géza Gárdonyi: Steloj de EGER**, esperantigis sinjoro **Jozefo Horvath**.



Kovrilpaĝo de la libro *Steloj de Eger*

/b/ Hungarlingve aperis interesa libro de rakontoj de s-ino **Adrienne Pásztor**. La por eldono elektita eldoneja presejo en Miskolc ne entreprenis la preson de esperantlingva

teksto, tial aperis nur hungare la: Tündérek Tánca/Danco de Feinoj titola, tre belaspekta libro, kiu estas eldonita okaze de la 50a jariĝo de ŝia esperantistiiniĝo kaj pro la 125 jariĝo de ekzisto de la internacia lingvo Esperanto. La libro aperis ĵus je ŝia 69a naskiĝdatreveno je la 31a en marto de 2012. Al neesperantistoj ĝi montras reklamon pri Esperanto per ĝia antaŭparolo prezentanta bele la esperantistan karieron de la aŭtorino Adrienne Földi-Pásztor. La libro aĉetebblas de la aŭtorino Pasztorne.Adri@gmail.com



Kovrilpaĝo de libro de s-ino Adrienne Földi-Pásztor

/c/ Same hungarlingve aperis riĉhava libro **de d-ro Imre Ferenczy**, kies titolo estas: Vasútorvos Voltam/Mi estis fervoja kuracisto. La verko enhavas priskribon de la tuta esperantista vivovojo de prezidanto de UMEA kun multaj belaj bildoj. Ĝi mendeblas ĉe la aŭtoro: iferdr@t-online.hu



Jen d-ro Imre Ferenczy; la aŭtoro

/d/ Aperis libro de prezidantino **Sylvia Hämäläinen** (en Tampere Finnlando). La nova libro estas titolita: „Ni semas kaj semas...” kaj temas pri Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj (1921-2011).

Gratulojn al la prezidantino de Esperanto Ligo de Finlandaj Esperantistaj Instruistoj, pro verko de historio de la Esperanto-instruo en Finnlando!

Inter iliaj internaciaj esperantistaj geinstruistoj rolis ankaŭ hungaroj: d-ro Ferenc Jáki (1970), József Páva (1985), Eva Farkas-Tatár (1990, 1991, 1993), Gyöngyi Mézes (1983), kaj Márta Kovács (1994, 1998), Stefan Mc Gill (1996, Novzelandano el Hungario). *Famdonis Ladislao Pásztor, Hungario*



Jen la aŭtorino Sylvia Hämäläinen

/e / Rete aperis nova esperantigita libro en la Hungara Elektronika Biblioteko de la Landa Biblioteko Széchényi en Budapeŝto

„La aventuroj de Andreo Jelky”, esperantigita de s-ro **László Vizi**, legeblas ĉe:

<http://mek.oszk.hu/10600/10612/10612.htm#n1>



Jen, László Vizi: la tradukanto

Donaco de honortitolo dum Urbotago de Kanizsa



/Foto: Kitüntető cím adományozása - kanizsa_varosnap_kituntettek.jpg/

Post 47 jara poresperanto laboro dum Urbo-tago de Nagykanizsa elstraran donacon povis transpreni nia samideano sinjoro Tibor Szabadi, kiun vi povas vidi meze sur la foto. Li estas videbla kun malhelaj okulvitroj.

Sur la donac-diplomo estis skribita: „Al la esperantista verkisto, arta tradukisto, pro prezento de Nagykanizsa kaj pro lia kultura verkado kiel verkisto, arta tradukisto, la-„Pro kulturo de Nagykanizsa” - honortitolon donacis la Ĝenerala Jarkunsido de Nagykanizsa.” /Laŭ la informo el la „KanizsaHír” alveninta la 11-an de majo 2012a, 21:22/ hír/közgyűlés.<http://www.kanizsahir.hu/kanizsahir/web/?menu=cikk&id=3638/>

Gratulo

La retrevuo Nordhungaria Informo elkore gratulas nian samideanon **Tibor Szabadi** pro lia grava sukceso, dezirante: pliajn bon-rezultan verkadon, multe da sano, entuzismo kaj sukcesoj.

Nome de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”: s-ino Adrienne Pásztor

Nova Esperantista Societo en Serbio

Gekaraj, interesa estas la ĉiutaga travivaĵo. Antaŭ unu monato ni fondis novan societon en Beogrado NOVA SENTO, kaj jen en via ĵurnalo mi trovis ĝis nun de mi nekonatan poemon de Baghy la Nova sento. Mi legos ĵaŭde en mia nova societo. Kaj nun mi sendas al vi mian rakonton kiu estos unu el 40 kiujn mi deziras ĉi jare eldoni. Mi esperas ke plaĉos al vi. Se vi deziras, vi povas ie ajn aperigi ĝin. Elkorajn salutojn de **Tereza Kapista** (Alv: la 23an de Marto de 2012.)

(**Noto:** la menciitan rakonton ni komunikos nur en la sekva numero de nia retrevuo NHI)

Printempa seminario en Skokovy okazis jam tridek kvinan fojon de la 16-a aprilo ĝis 22-a Aprilo 2012.

Raporton petu de: **drahotovaesperanto** drahotovaesperanto@seznam.cz

HEA kunvenis bonetose

Hello Esperantistaj Amikoj!

La 2012-jara Ĝenerala Asembleo de Hungaria Esperanto Asocio okazis la 20-an de majo, sunbril-dimanĉe. ***Nova hejmo – pli konvena, aŭtobuse alirebla.** Adreso: H-1146 Budapeŝt, Thököly út 58-60, tuj apud la brik(nov)gotika preĝejo de la Dominikanoj, ĉe haltejo de pluraj bluaj aŭtobusoj (5, 7, 173) La unua saluto estis ankaŭ lasta: la forpasintan profesoron **Haszpra Otto** (1928-2012) adiaŭis **Dudich Endre**, honora prezidanto de HEA. „*Kio estas diamanto, restas diamanto.*” La Ĝenerala Asembleo elektis G.Nagy Roberton honora membro de HEA. Gratulon! ***Ŝanĝo de vicprezidanto.** La Ĝenerala Asembleo per unuvoca baloto akceptis la skribe anoncitan memvolan demision de vicprezidanto **Harnyos Ferenc** (en lia foresto), kaj elektis novan ĝeneralan vicprezidanton, en la persono de fraŭlino **Lindwurm Edit**. La hejmpaĝon de HEA redaktos Eszényi József. ... (Raportis: D-ro Endre Dudich)

Gravaj Tagoj en Hungarujo

La 5a de junio: Medioprotekta Mondo Tago estas.

Mi skribis la sekvajn en mia eseo titolita: Tutmondaj defioj de la klimatoŝanĝiĝo:

„... NATURO KAJ MEDIOPROTEKTADO

Ekde sia apero sur la planedo, la homo laŭ siaj bezonoj transformis la naturon. Ĉi proceso ne estas haltigebla, ja la homo faras ĉion eblan en intereso de sia komforto kaj agrabligo de sia vivmedio. Sed tamen ni ne devas ignori, ke al la protekto de nia medio apartenas ankaŭ la naturprotektado. La pretendo de la naturprotektado tiam enfokusiĝas pli forte, kiam la homo estiĝas atestanto de definitiva formorto de tiaj bestoj, kreskaĵoj, kiuj ĝis tiam estis integraj partoj estis nia vivularo, kiu pliriĉiĝis pere de ili.

Por mildigi ĉi tiun procezon, en 1935 estis kreita la unua naturprotekta leĝo, sed tiu laboro progresas malrapide. De tiam realiĝis ankaŭ en Hungarujo diversaj naturprotektaj distriktoj, Naciaj Parkoj, kiuj pro siaj raraj protektindaj bestoj, plantoj aŭ naturformacioj prezentas parton de la Monda-Heredaĵo. Ĉi tiuj estas niaregione la teritorio de Nacia Parko de montaro Bükk, en Kelemér la tn: Pramarcĵaj-lagoj, la pr-arbedejo de juniperoj de Nacia Parko en Aggtelek. Sed protekton ĝuas ankaŭ la unikaj plantoj, la raraj arbospecioj kiuj troveblas en arbomuzeoj, botanikaj ĝardenoj, aŭ ili vivas sovaĝe. En nia regiono Nord-Hungario menciindaj estas sen pretendo de la senmankeco: la Hungara kolĉiko kaj la Stipo sur rokoj de Boldogkőváralja. En Slovakio sur flankoj de montaro Granda Fatro: troveblas la Orkido-specioj, kaj en la francaj Alpoj la sovaĝe kreskantaj Orkidoj kaj Azaleoj, kiujn ni povis admiri dum niaj ekskursoj.

RESPONDECO KAJ EBLECO

La variaj legitaj kaj aŭskultitaj opinioj firmigis mian opinion, ke la *klimatoŝanĝiĝo ne estas puno de Dio aŭ ekprovo de homo de li, nek la alveno de la Apokalipso, sed estas natura procezo de la historio de Tero.* La nuna stato povos daŭri eĉ plurmiljarojn ĝis

elformiĝo de la sekva, radikale malsimila klimato. Sed per haltigo aŭ moderigo de nia mediopoluciado ni povos havi dum longa tempo la konvenan teran vivmedion por niaj posteuloj.

Jen tio estas la vivkondiĉo kaj respondeco de nia specio sur la Tero. Nia Tero donas nian lulilon, nutraĵon, trinkaĵon, prosperon, la lokon, kien niaj proksimuloj enterigas niajn korpojn, cindrojn. La protekto de nia medio, vivloko por la pluvivo de nia specio nepre bezonatas, kaj tial estas neevitebla!”

S-ino Adrienne Földi-Pásztor

La 23a de junio: Tago de Suno

Maŭrico Jókai (fama hungara verkisto) skribis pri la sekvaj en sia romano „Filoj de la Ŝtonkora Homo”, sur la paĝoj 453a kaj 455a, en la ĉapitro: Perphelia /esperantigita de László Pásztor/

” Perhelia

Kiuj havas ankoraŭ unu hungaran ĵurnalon 1849an (oni presis malmulte el ĝi kaj ankaŭ tiujn oni neniiĝis), ili trovas en ĝi unu mallongan sciigon, laŭ kiu videblis grandioza haloo sur la ĉielo je la 20-a de junio inter la horoj 10 -12.

Estos homoj, kiuj rememoros tion. Tio estis la plej grandioza „perhelio”, kion oni povis vidi.

Samtempe videblis la sunkrono, la sunhaloo kaj la flanko suno.

La sunkrono nur unufoje videblas dum unu generacio. La sunhaloo po jarcentoj nur unufoje. La tri fenomenoj kune aperinte estas ĉiela miraklo pri kiu la natursciencistoj verkas librojn – dum aliaj pacaj tempoj. ... La 20-an de junio popolribelado okupis la Tibisko-apudan ebenon.

Tiutage varmega vetero estis, la ternivelo radiis la varmegon kaj la ĉielo paliĝis. Ĉirkaŭ la tagmezo miraklaj fenomenajoj aperis sur la pala ĉielo. La haloo de la Suno forviŝiĝis kaj ĉirkaŭ ĝi angulaj spokoj aperis. Ties nomo estas sunkrono.

Poste de la Suno malproksime videblis unu rondforma lumkorto ĉirkaŭ la Suno, mezo de la korto estas pal-ruĝa, de la Suno eksteren estas pal-verda kiel la ĉielarko. Tio estas la haloo.

Sur la orienta flanko de la lumkorto paliĝis alia Suno. Ambaŭ estas palaj, havas punktitaĵojn. Pro tio oni ne povis diferencigi la veran Sunon.

La popolo estis terurigita pro la vidindaĵo. Neniu vivanta homo vidis al tio similan. La klare pensantaj homoj konas ĝin nur el libroj, kaj scias ke tiu ĉiela spektaklo estas videbla nur unufoje dum unu jarcento.

Sed la nekleraj superstriĉuloj frustradas: „Ĝi estas signo de la fina danĝero sur la ĉielo!...”

/La hungarlingvan romanon esperantigis László Pásztor/

La 27a de junio: Tago de la Hungariaj Poloj.

Pri la Poloj vivantaj en la niaregiona kunigita departemento Boršod-Abauj-Zemplén, promesis sendi informan artikolon: Halina s-ino Bártfai (membro de la Miskolc-urba Minoritata Registaro). Ĝin ni publikos en pli malfrua numero de nia retrevuo NHI..

Kvankam **la 29a de junio:** Tago de Danubo estas en Hungarujo, en nia Landa Fremdlingva Biblioteko (OIK en Budapeŝto) jam la *8an de majo* okazis la inaŭguro de fotoekspozicio pri Pontoj de Danubo, prezentitaj fotoj el libro „Danubaj pontoj de la arbaro Nigra ĝis la maro Nigra”, verkita de s-ro Gyukics Péter [petro djukiĉ]. El la 342, la elektitaj pontoj spegulas la multspecon de transiĝiloj de la rivero. La fotoj de la elektitaj pontoj pretigitaj el ligno, fero kaj betono donas fidelan kversekon de la ponto-etato de la granda rivero. La fotaro prezentis unu el pontoj de ĉiuj landoj Danubo-apudaj.

(S-ino Adri Pásztor, laŭ Novaĵ-informa letero de OIK)

Raporto el Cieszyn 2012

Estis tie honorigitaj du polaj esperantistoj okaze de la festo de Pola Konstitucio per la plej grandaj urbaj valorigoj. Jen la nova elsendo de Verda Stacio. Programero estos elsendata per aeraj frekvencoj de Ĉina radio internacia la 16-an de majo 2012 laŭ pekina tempo en programero „Inter ni” . www.wix.com/pably0/tesin aŭ www.verdastacio.eu


Paul Pavlicek verdastacio@gmail.com

Gratulo

Ni deziras pliajn sukcesojn al la geaŭtoroj de la aperintaj novaj libroj, al la nova redaktorino de Heroldo de Esperanto kaj al s-ino Tereza Kapista kiu estas ne nur aŭtorino de diversaj verkoj sed ankaŭ elstarulino de la lingvoinstruoj kaj de la Serbia Esperanto movado. Same plu, ĉiam antaŭen! Bonan sanon al la bona laboro!

Membroj de la Miŝkolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”

Piroska Csorba-Vilmos Fedor Legendoj de Miŝkolco



La esperantigo kaj publikigo de la libro „Legendoj de Miskolc” permesita estas de **la aŭtoroj:**

Piroska Csorba – Vilmos Fedor. La libron - eldonitan en 2011- esperantigis: **László Pásztor**

László Pásztor

Piroŝka Ĉorba Legendo pri la trafiklampo (Esperantigita de László Pásztor)

Se unu Miŝkolcano diras al la alia, ke ili renkontiĝos ĉe „la trafiklampo”, tiam la aliulo scios precize, ke loko de la rendezuo estas la vojkruciĝo de stratoj Széchenyi [se:ĉenji] kaj Szemere [semere]. Ĉar kvankam en la urbo multloke direktas la trafikon trafiklampo, kiun oni menciadas kiel trafiklampo, sed „la” trafiklampo signifas nur ĉi tiun lokon por ĉiuj. Ankaŭ por tiuj, kiuj ankoraŭ ne vivis tiam, kiam en Miskolc nur ĉe tiu ĉi vojkruciĝo estis trafiklampo, kies funkciadon unu homo direktis, kiu sidis en unu kaĝo cilindroforma farita el

betono kaj vitro. Al ĉi tiu kaĝo kondukis ŝtuparo kaj estis en ĝi nur tiom da loko, ke la servon plenumanta homo, la policisto apenaŭ povis sidi en ĝi, kaj povis atingi butonojn de la konzolo. Li, kaj la cilindroforma kaĝo estiĝis „la trafiklampro”, simbola loko de la urbo kaj por longa tempo la plej populara renkontejo.

La kaĝo havis ĉirkaŭ si vitrofenestron, ĝin tegmentis rondforma ĉapo. Tra la vitrofenestro de la supro videblis la tramoj, kiuj malrapidigis, haltis, poste ekiris plu sur la reloj. Oni povis vidi el la sukerejo „Piva” elpaŝantajn glaciaĵojn manĝantajn ridetantajn dekkelkjarulojn, la malfacile paŝadajn maljunulojn, la energiajn mezaĝulojn, la rendezuon atendantajn, bele vestitajn ekscititajn fraŭlojn - laŭvorte - la vivon, kiu svarmis, pulsas en la interna urbo.

Sed memkompreneble tra la vitro fenestroj oni povis vidi ne nur eksteren, sed ankaŭ internon de la kaĝo. Sed malofte estis iu, kiu surrigardis la unupersonan kaĝon, ja en ĝi estis neniu interesajo: nur unu policisto sidis en ĝi senmove kaj atenteme. La pordo de la kaĝo kelkfoje malfermiĝis, la deĵoristo transdonis la lokon al lia ŝanĝo-kunulo. Sed nek tion atentis iu, kiel nek je tio atentis iu, ke iutage forrestis la ŝanĝo de la deĵoristo. Alvenis la posttagmezo, kaj jam komencis krepuskiĝi, sed klingon de la kaĝo neniu subpremis de ekstere kaj de interne. Neniu iris en ĝin kaj neniu eliris el ĝi. Kiam vesperiĝis, la lampo ne montris jam ruĝan, verdan, flavan - blinde ĝi rigardis en la nokton, dormis kiel loĝantoj de la urbo. La Luno, kiu plenumas servon ĉe kruciĝponto de landvojo de la ĉielo, rigardante malsupren, opiniis vidi figuron de homo en la vitro-cilindro, sed ĝi pensis tion fantazio. Sed vere iu sidis en la kaĝo: ties senmovan silueton la lumoj de la lampoj projekciis sur ekranon de la malhelo.

Sekvatage matene – laŭkutime – oni denove ŝaltis la lampojn kaj iliaj koloroj brilis paroleme.

Ruĝa - malpermesata, flava - atendu! Verda - vi rajtas plu iri! – diris la lampoj, kaj la aŭtoj, tramoj kaj la piedirantoj obeis al la mimiko. Nur kelkfoje okazis, ke iu malobeis la regulojn. La policisto vidis el la kaĝo ankaŭ ĉi tion, kapbalancis, sed ne cerbumadis pro la homa naturo, kiu strangmaniere duobla estas: unufoje ĝi kreas regulojn, aliffoje klopodas tiujn malobei. La policisto meditis nek nur pri la homa naturo, sed nek pri alia afero. Tiu li nur atendis la alian deĵoriston por ke li povu ekiri hejmen. Sed neniu venis kaj li restis plu. Tion li pensis, ke li kapablas elteni du skipojn en laboro, poste pro la plusa laboro li ricevos libertagon. Kaj ĉar pasis ankaŭ la dua skipo, jam li ne volis stari, en la kaĝo pasigis la nokton: tute komforte li kapablis dormi ankaŭ sidante, ankaŭ sonĝis – kvankam li ne memoris enhavon de la sonĝo, sed la agrablan guston de la sonĝo li sentis ankaŭ matene vekigante.

Tagoj pasis sen tio, ke iu estus transpreninta la deĵoron kaj li finis sian laboron persiste. Kvankam dum la dua semajno tiu faris movon hezitan por stari kaj malfermi pordon de la kaĝo, sed la deziron bridis, neniigis la devokonscio kaj li restis. Post la tria semajno jam li ne kalkulis la tagojn, li ne sciante ĉu lundo estas aŭ vendredo, ĉu estas junio aŭ aŭgusto. Tie, en tiu kelk-kuba metra aera spaco de vitrocilindro la tempo estis alie natura, kiel ekstere, eble ne ekzistis ĝi, eble en ĝia loko speciala tempovakuo estiĝis, unu peco da eterneco, elŝirita el koordinatoj de la homa vivo.

Kaj kie la tempo ĉesas, tie ne estas malsato, soifo, laceco, malpacienco, timo. En la kaĝo sidanta homo ne sentis tiujn, kiel ne sentis ankaŭ la strat-supera cilindra kaĝo, kiu la policisto ĉirkaŭprenis. La kaĝo kaj la policisto iĝis tute unu, ili estis kune „la” trafiklampro, la moderna statuo de la atento kaj devosento.

Fluis-pasis la tempo. La ĉielo, la tero, la arboj, la urbo laŭritme ŝanĝis sian vizaĝon, kaj vestaĵon, vestis sin foje bunta, foje blanka, foje laŭte svarmis, foje silentiĝis, foje sunlumo surbrilis ĝin, aŭ pluvo vualigis ĝin. Sed „la trafiklampro” restis senŝanĝa kaj senmova.

Dum iu somera tago ĉe „la trafiklampro” du pubertuloj renkontiĝis unu kun alia: somera ferio estis, ili volis vagi sencele. Iu rigardis al la ĉielo, kie iu nuboj provis kovri la sunlumon kaj dume ekvidis la kaĝon.

- Venu, ni grimpu supren, rigardu „la trafiklampon”!

Jam ili ankaŭ grimpis supren sur la ŝtupoj kaj por vidi pli bone, ili siajn vizaĝojn tute premis al la vitro kaj gapis en la kaĝon. Kiam ene la uniforma homo movis sin kaj etendis manon al unu ŝaltilo, ili ektimis kaj tre rapide malsupren iris, kaj kuris tute ĝis monto *Avas [avaŝ]*. Tie ili haltis por ripozi iom kaj finfine ili povis paroli pri la vidaĵoj. Sed pri la viditaj aferoj ili ne povis interkonsenti, ĉar unu diris, ke „La trafiklampon” estas vera homo, la alia asertis, ke ĝi estas roboto en uniformo. Ili estus povintaj facile pridecidi la disputon, se ili reiros kaj denove rigardos pli bone, sed ili ne havis kuraĝon.

Krom ili nur unu blondajn harligojn portanta kvin jaraĝa knabineto interesiĝis pri la Trafiklampon. Eble pro tio, ĉar ŝi rare iris en la internan urbon, por ŝi estis miraklo ankaŭ la kolorojn ŝanĝadanta trafiklampon. Unua foje ŝi ankaŭ ne volis transiri sur la zebrostrio, vane eklumis la verda lampo. Tiukaze ŝi diris:

- Mi atendas, ĝis denove verdos.

Kaj la lampoj denove komencis lumi laŭvice: ruĝa-flava-verda.

- Ĉu tiu ĉi lampo ne estas hungara? – demandis ŝi gapmire de sia patrino, kiu nur tiam komprenis la vortojn, kiam klinis sin al la etulino.
- Kial ĝi ne povus esti hungara, mia filineto?

La filineto respondis je tio:

- Ĉar la koloroj ne estas ruĝa-blanka-verda.

Kiam ŝia patrino klarigis signifojn de la koloroj, ŝi plu demandis, ja la infanoj estas tiaj, ke ili malfermas pordojn, pordegojn ankaŭ tie, kie la plenkreskuloj vidas nur murojn. Ŝi demandis tion; kiu funkciigas la lampojn kaj intertrempe ŝi pensis pri tio, ke hejme starante sur la brakseĝon ŝi ekzercis la ŝaltadon de la lampo, oni ne ĝojis pro tio. Veras, ke la lampo hejme havas nur unu koloron.

Ŝi iĝis tute ekscitita, kiam ŝia panjo montris al ŝi „la „Trafiklampon” en la alto. Ekde tiam kiam ili iradis en strato Széchenyi ŝi ĉiam surrigardis la trafiklampon. Ho, kiom volonte ŝi estus grimpinta al tiu por rigardi kia povas esti la Trafiklampon de proksimo! Certe povas esti malbone tie por tiu, fermita en la kaĝon! Vero estas, ke tiu tiam faras ruĝan, flavan, verdan kolorojn kiam li volas, neniu riproĉas pro tio! - Ŝi pensis ankoraŭ pri multaj similaj aferoj, sed rakontis pri tiuj al neniu.

Okaze de ŝia naskiĝtago - en aŭgusto – ŝi ricevis kanarion de siaj gepatroj. Loĝejo de la birdo estis unu neĝblanka kaĝo, en ĝi estis ujoj por trinki, manĝi, sidligno kaj balancilo. Tiel ŝajnas, ke ankaŭ la kanariidoj ŝatas por ludi.

Sed ĉi tiu birdido ne havis ŝaton por ludi, sed silente sidaĉis sur la sidligno.

- Kio estas ĝia nomo? - demandis la knabineto, ĉar ŝi volis peti la kanarion por ludi kune.
- Ĝi ankoraŭ ne havas nomon – respondis ŝia patro. – donu vi nomon al ŝi!

La filineto meditis longtempe, poste diris:

- Trafiklampon estu ĝia nomo!

Ŝiaj gepatroj ege ridis, sed konsentis tion kaj ankaŭ ili nomis same la birdidon. Ili ne longtempe povis, ĉar la filineto iutage penportis la kaĝon en la ĝardenon, malfermis ĝian pordeton kaj atendis. Sed la kanario nur palpebrumis malĝoje kaj ne movis sin. La filineto vane instigadis ĝin:

- Forflugu, Trafiklampo!

Tiam ŝi elprenis la kanarion el la kaĝo kaj metis sur ŝian manplaton. De tie ĝi forflugis.

Kiam post kelkaj semajnoj ili promenis en la interna urbo, la patrino iris en la sukeraĵejon por aĉeti sukeraĵojn. La filineto ne volis stari en vico tie, restis ekstere antaŭ la sukeraĵejo kaj ŝi promesis, ke ŝi ne paŝos de sur la trotuaro, se la lampo montras verdon. Ŝi ne paŝis de la trotuaro, sed atentis la eklumiĝantajn lumojn. Estas vero, ke ŝi ne estis lernantino, sed jam sciis skribi, legi, eĉ kalkuli. Ŝi povis kalkuli ĵus ĝis tridek, kiam la ruĝa ŝanĝiĝis flava. La koloro de la flava daŭris ĝis ok kaj de la verda denove ĝis tridek. Multe ŝi kalulis ilin, sed ĉiam havis la saman rezulton. Certe ankaŭ la Trafiklampo kalkulis tion – pensis en si men - kaj estas bona, ke ĝi ne eraras. - Certe estas malfacila kalkuli tuttage ankaŭ tiam, se ĝi devenas el kurento.

Poste ŝi ĉirkaŭrigardis, konvinkante, ke neniu atentis ŝin, singarde paŝadante grimpis al la vitrokaĝo. Ŝi estis malgranda, apenaŭ atingis la klinkon. Ŝi malfermis la pordon de la kaĝo kaj pro la eksciteco ankaŭ ŝia spiro haltis. Meze de la vitrokaĝo muntita per la ĉiuspecaj turnorigliloj kaj butonoj sidis tie „la trafiklampo” kaj rigardis rekte al ŝi. Ĝi havis belegajn, brilajn, verdajn okulojn. La filineto nur rigardis ĝin, dume neatendite ĝi iĝis ruĝa.

Oni diras, ke subite ĉesis la vivo ĉe vojkruciĝo de stratoj Széchenyi kaj Szemere. La lumo de la trafiklampo estingiĝis, la aŭtoj, aŭtobusoj, tramoj haltis, pordoj de la vendejoj konsternante atendis kiel kutimas inter malfermo kaj fermo. Kvazaŭ iu trans metintus la urbon en iun filmon kaj sur la ekrano tiu fiksintus unu bildon: la nunan. La rigardoj de la homoj turniĝis al la cilindroforma fero- betona vitra konstruaĵo, malantaŭ kies malfermita pordo aperis unu blonda harliga knabineto kvin jaraĝa kaj singarde ekiris malsupren sur la ŝtupoj. Kelkfoje ŝi rerigardis, kvazaŭ kontrolintus: ĉu tiu estas malantaŭ ŝi, kaj prenante ŝian dekstran manon, postiras? Tiu estis unu viro en uniformo strange mekanike movante sin, kvazaŭ ties korpopartojn movigus ne muskoloj kaj tendenoj, sed mekanika sistemo de ŝraŭboj kaj dentradoj.

Atingante subon de la ŝtuparo, „La Trafiklampo” delasis manon de la knabineto, turnis sin al ŝi kaj honorsalutis, kiel la soldatoj antaŭ la generaloj. En ties okuloj brilis ruĝa lumo ĝis kiam, homo kalkulas malrapidritme ĝis tridek. Poste la ruĝa lumo estingiĝis kaj en ties rigardo aperis flava lumo simila al la tigro de Bengalo. Post ok minutoj ankaŭ tio malaperis kaj ekanstataŭis ĝin la verda koloro. Subite ankaŭ la trafiko ekiris, kiel ankaŭ aliam, somere, posttagmeze en la interna urbo. La motoroj de aŭtobusoj kaj aŭtoj ekfunkciis laŭtege, gumoj de la bicikloj bremse frotiĝadis sur la vojbetono, la tramoj sonoretis, ŝuoj de la piedirantoj frapetis; la urbanoj svarmis, spiris, iradis-venadis, kuradis tien-reen, kuris, promenis, promenis reve, renkontiĝis kun iuj kaj disiĝis de tiuj, ekiris kaj revenis. Unuvorte en la urbo la vivo ekiris.

El la sukeraĵejo elpaŝanta patrino, en kies sako multe da sukeraĵoj estis, trankviliĝante vidis, ke la knabineto tie staras, kie promesis: ŝi estis ĉe ŝtuparo kondukanta al „La” trafiklampo. Ili ekiris man-en-mane. La knabineto rerigardis de la stratoangulo al la kaĝo malfermitporda, m en kiu jam sidis neniu. Ŝi sentis, ke la pasanta tempo forlavis la figuron de la trafiklampo kaj ankaŭ la ŝajne ne realan eventon en rememoro de la urbo Ŝi sciis, ke la nomoj - kiel sur epitafioj de la tombejoj - transvivas ilian portanton. Ŝi sciis, ke la nomo de „La Trafiklampo” ankaŭ tiam vivos, kiam jam ne ekzistos eĉ la loko de la vitrokaĝo kaj neniu rememoros la kaĝon. Kaj tiam en ŝia lastfoja rigardo sur ĝin enestis la promeso, ke ŝi forgesos ĝin neniam kaj ne permesos forgesi ankaŭ al aliuloj.

Ŝercoj

Granda ŝanĝo

- Mia karulo, fantastike ŝanĝiĝis vin du boteloj da vino.

- Mi ne drinkis tiom.
- Sed mi jes.

Envio

- Sinjoro, vi povas danki al via propra forta organismo, ke vi saniĝis.
- Bona estas, ke vi diris tion nun! Mi ĵus nun volis pagi dankmonon al vi, sinjoro doktoro.
 - Sinjoro doktoro! Mia koro pulsas, mia talio doloras, mi kapturniĝas, mia koro pikas kaj en mia stomako estas spasma.
- Mi envas vin pro via forta organismo, kio toleras tiujn.

Mallonga telefonado

- Mi gratulas, kara mia, ĉar dum dudek minutoj vi finis la telefonadon. Kun kiu vi parolis?
- Mi ne scias. Ĝi estis misa telefonvoko.

La oro-stango

- Infanoj, diru; kio okazos pri la orstango, se ni lasas ĝin subĉiele?
- Oni forŝtelos.

Eniĝo en garaĝon

- La edzo nun ricevis la kondukrajtigilon. Li iris hejmen unufoje per la aŭto.
- Ĉu vi metis la aŭton en la garaĝon? – demandis lin lia edzino.
- Jes, parte.

Tempo de atendado

- Kelnero! Ĉu mi devas sidi ĉi tie ĝis noktomezo, ke mi ricevu mian konjakon?
- Ho, tute ne, mia sinjoro! Ni fermas la drinkejon vespere je la 9-a!

Esperantigis László Pásztor

“Eksplozo” de artikoloj kaj intervjuoj okaze de la eldono en Esperanto de la albana renoma romano “Hunda Haŭto” de Fatos Kongoli

La 18an de aprilo 2012 almenaŭ 10 el la albanaj tagĵurnaloj de la ĉefurbo kaj pluraj televizioj informis pri la solenaĵo okazinta en Akademio de Sciencoj por la eldono ankaŭ en Esperanto de la verko de ties membro Fatos Kongoli.

Ĉikaze ĉeestis kaj spegulis la eventon kelkdekoj da ĵurnalistoj.

Jen kelkaj titoloj aperintaj tagon poste sur la ĉefaj tagĵurnaloj:

Kongoli kaj Kadare en la rara lingvo Esperanto

Atestoj pri Esperanto en Albanio. Dokumento el la jaro 1922

Tomasz Chmielik: Kadare kiel Kafka, la kialoj de mia elekto por la verko de Kadare “Palaco de la sonĝoj”.

Fatos Kongoli: Miaj duboj pri Esperanto.

Bardhyl Selimi: Jarcento kun Esperanto en Albanio

Post Kongoli ankaŭ Kadare kaj Lleshanaku en la lingvo Esperanto

Fatos Kongoli: Mi surpriziĝis kiam oni proponis al mi la Esperantan Lingvon

La lingvo de Poŝtoj kaj Fervojoj

Bardhyl Selimi (Mezini): Ni estas tradukantaj ankaŭ Kadare-n en la lingvo Esperanto



Momentoj tuj post la fino de solenaĵo. Fone vidiĝas ankaŭ Chmielik kaj Fatos Kongoli

Kaj nun pli detale unu el la intervjuoj

Ĵurnalo Panorama, 18an de aprilo, 2012

Post “Skanderbeg” en la jaro 1929, en Esperanto la romano de Kongoli.

La romano “Hunda Haŭto” estas tradukita en 7 diversajn lingvojn, sed en Esperanto?!

Tamen tio okazis. Fatos Kongoli fariĝis la unua albana verkisto kiu estis tradukita en Esperanton, lingvo naskita danke al la deziro por servi kiel la komuna lingvo de la tuta mondo.

“Mi neniam imagis, ke iu el miaj verkoj tradukiĝus kaj eldoniĝus en la lingvo Esperanto. La iniciaton entreprenis la pola esperantisto Tomasz Chmielik, kiu estis leginta tion en la pola kaj helpe de albana esperantisto, Bardhyl Selimi, proponis al mi la tradukon, ĉar estis trovinta multon interesan en ĝi”- diris hieraŭ Kongoli en la renkontiĝo aranĝita okaze de prezentado de la tradukaĵo de lia romano “Hunda Haŭto”, eldonita en la albana de “Toena”.

Fatos Kongoli estas unu el la plej konataj eksterlande albanaj verkistoj. Liaj romanoj estas tradukitaj en multaj lingvoj. Kaj li daŭre verkas. Lastan aŭtunon li eldonis la romanon “Si-dore-la”.

Demandite ĉu li verkas novan romanon, li respondas: Romanoj ne povas eliri kiel la panbuloj el la panbakejo.

Sed nun lia plezuro plej lasta estas la eldono de la romano “Hunda Haŭto” en aparta lingvo, kiel Esperanto, kiu havas jam siajn adeptojn ankaŭ en Albanio.

La sekretario de la Albana Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Bardhyl Selimi, kontribuante en la tradukado de la romano de Kongoli, helpante la polan tradukiston Chmielik, rakontas al ni pri la nombro de esperantistoj en Albanio, pri la unua esperantisto nia, pri la klopodoj de la iama ministro de edukado Rexhep Mitrovica dum la jaroj 1920aj ks.

Kiom da esperantistoj estas en Albanio?

Ekde la jaro 1993 estas transpasintaj la lernokursojn 450 personoj. Multaj el ili estas jam studintaj eksterlande uzante Esperanton kiel laborlingvon, 20 el ili eĉ akiris bakalaŭrecon.

Ĉu tiu nombro estas tre malgranda?

Jes, tiel estas, se ni pripensas ke dum la jaroj 1920-aj la ministro de edukado, Rexhep Mitrovica, en la registaro de Xhaferr Ypi, iniciatis enkadre de kelkaj eŭropaj landoj por enkonduki Esperanton eĉ en la bazajn lernejojn, sed tiutempe la franca delegito vetois, opiniante ke la franca plu estos reganta.

Ekde la jaro 1929 estas eldonita la unua libro “Historio de Skanderbeg” originale en Esperanto de Cuk Simoni, dum en la jaro 1905 aperis la unua esperantisto Dom Lazer Shantoja.

Elstara esperantisto estis ankaŭ la unua albana kardinalo Mikel Koliqi, lia frato Vilhelm Kliqi, Mark Kakarriqi kaj Zef Kakarriqi kaj multaj aliaj personecoj, ekde la unuaj jaroj de la pasinta jarcento.

Do, se en la komenco de la lasta jarcento oni parolis pri personecoj hodiaŭ ŝajnas ke la intereso estas malpli granda, kial do?

Tio rimarkeblas ne nur en Albanio, sed ankaŭ en aliaj landoj kaj estas kompreneble pro problemoj renkotataj de esperantistoj. Plej multe temas pri la premo far grandpotencoj, aparte de tiuj angloparolantaj kaj pro konservatismo. La novaĵoj kaj nekonataĵoj malfacile alproprigiĝas.

Ni subtenas Espeanton, ĉar ĝi estas ankaŭ helpilo por eklerni la aliajn lingvojn. Se la gelernanto lernos dum 4 monatoj Esperanton, li akiros pli rapide kaj pli firme sciojn pri aliaj fremdlingvoj, kiel la angla, germane ks.

Alia faktoro estas la estonto de Europunio. Ĝi bezonas komunan lingvon, sed ankoraŭ oni ne konsentas pri iu nacia lingvo pro naciaj ĵaluzoj, dume Esperanto estas funkcia lingvo, pretpreta kaj parolata de 2 milionoj da homoj en 120 landoj de la mondo. Kial oni ne ĉirkaŭbraku ĝin?

Sed la lingvo kaŝas post si ankaŭ kulturon aŭ tradicion, kion do Esperanto ne havas.

Esperanto ne pretendas krei popolon en si mem, sed estas ia pontolingvo por helpi al homoj interkomunikiĝi kaj same protekti la naciajn lingvojn.

Kiam ni lernas fremdan lingvon, kune kun ĝi venas ankaŭ la kulturo de ties popolo al kiu ĝi apartenas. Nun multaj diversaj popoloj “plendas” pro dominanteco de la angla, ĉar iliaj lingvoj estas damaĝigantaj pro misuzado de terminoj el la angla lingvo. Dum Esperanto ĝuste tion antaŭevitas.

Kie baziĝas Esperanto?

La duono de la vortoj estas jam internaciaj, tial vi komprenis multon el ili. Dum la cetera parto ne estas inventita, sed ĉerpita el apartaj lingvoj, ĝuste pli kurtaj, pli fonetikaj el la germane, slava, latina.

Certe granda parto elvenas el la latina, kiu estas la bazo de pluraj eŭropaj lingvoj, sed ĝi ne estas mem latina. Ĝi posedas tre simplan gramatikon kaj sistemon de sufiksoj kaj finaĵoj, per kiuj ĝi kreas novajn vortojn.

Do Esperanto apenaŭ estas nekonata lingvo, estas evidente kaj sen esceptoj.

Vi persone kiel kontaktiĝis kun Esperanto?

Mi kontaktiĝis kun Esperanto ekde la jaro 1961, kiam mi aĝis 16 jara. Ekzistis tiam kerno de esperantistoj en la Ministerio pri Konstruado kun konataj inĝenieroj, kiuj malfermis lernokursojn en universitato, ankaŭ en la domkulturo “Ali Kelmendi”.

Ĉu la reĝimo ne malpermesis tion?

La tiama registaro ne subtenis, sed ankaŭ ne malhelpis ĝin, ĉar ĝenerale albanoj ne havas fobion al la lingvoj. La totalisma reĝimo havis fobion al la homaj kontaktoj, fobion al la rilatoj kun la fremduloj, ĝi volis kontroli ĉiun ĉelon de la socio.

Mi sekvis lernokurson unufoje semajne, per malgranda broŝuro nomita “La Ŝlosilo de la lingvo”, dum nun estas multe de libroj kaj votaroj. Nur en interreto estas tiom da materialoj..

Ni revenu al la traduko de Kongoli, kiom malfacila estis ĝi?

Estis malfacila, sed Esperanto estas tre kapabla por trovi la ekvivalentajn vortojn, kio ne okazas en la naciaj lingvoj. La Ĉefan laboron faris Tomasz Chmielik kiu deziris kunfrontigi ĝin al la originalo en la albana kaj mi helpi lin pri tio. Ne estis simple traduki, sed pli facile ol en la aliaj lingvoj. Ĉiuj klasikaj verkoj, inkluzive la Bibliion, Malnovan kaj Novan Testamenton estas jam tradukitaj tre fidele en Esperanton.

Espeanto ne estas plu eksperimenta lingvo, sed funkcia.

Ĉu alvenos aliaj tradukoj?

Estas en proceso la traduko de “Palaco de sonĝoj” de Ismail Kadare KAJ same kompleta ciklo kun poeziaĵoj de Luljeta Lleshanaku kaj oni akiris permeson por traduki ankaŭ la romanon “La perdinto” de Fatos Kongoli.

Enesperantigis Bardhyl Selimi – Pri la novaĵo informis Bardhyl Selimi, Germain Pirlot kaj Jolanta Kieres

Noto pri la nova albana romano en Esperanto

Laŭ niaj informantoj ekde 1929 nun aperis unue nova esperantlingva traduko de albana romano. Kune kun la aŭtoro Fatos Kongoli unu grupo de poloj same partoprenis la festan aranĝaĵon. La pola esperantista grupo pasigis unu semajnon en Albanio, dum kio s-ino Jolanta Kieres tenis instruprezenton de la internacia lingvo Esperanto al aro de gestudentoj. La sukceso de la prezenta instruo Cseh-metoda laŭ libro de Stano Marček, estis grandioza, plenigite la partoprenantojn per admiro kaj senlima ĝojo. La nun aperintran esperantigitan romanon eblas aĉeti ĉe Libroservo de UEA: www.uea.org



Sur la unua bildo vi povas rigardi la kovrilpaĝon de la albana libro, kiel plakaton estanta sur muro de la albana Akademio de Sciencoj, sur la alia foto – kiun same s-ro Stanislaw Mandrak pretigis ĉefdelegito de Pollando – meze videblas la tradukinto Tomasz Chmielik, apud li (la senharulo) estas Fatos Kongoli, aliflanke videblas s-ro Bardhyl Selimi, kiu sendis al mi la priskribon de la evento en la Bulteno de Albanaj Esperantistoj, sur la sekva bildo vi povas rigardi bildon pri la intervjuo, sur la kvara videblas la polino s-ino Jolanta Kieres prezentita esperanto-studhoron al albanoj. Sur la pliaj bildoj vi povas rigardi la gestudentan aŭdiantaron de la lingvoinstruza horo, kaj grupojn de albanaj kaj polaj gesamideanoj en Tirana. (El Bulteno de Albanaj Esperantistoj alveninta la 25an de aprilo 2012-a).

S-ino Adri Pásztor

IKUE en Pécs

Papo Benedikto la 15-a notis la 2012an jaron kiel Jaro de Kredo. Tio signifas - parte de ĉiu katolika kredanto - favoran kazon por pli profunde kompreni la fundamenton de kristana kredo kaj la kompletan certecon de kredo en la Eklezio, kontraŭ la necertecojn, dubojn naskitaj rigardpunktoj sugestitaj pere de la nuna historia periodo kaj socio. Je ties disputadoj kaj la fortigo de la kredo kristana oni aranĝas tiun ĉi mondkongreson inter 14-21 de julio en urbo Pécs. Vi povas informiĝi kaj aliĝi ĉe la retadreso

Kongreso@ikue.org kaj ikuekongreso@gmail.com aŭ kragota@freemail.hu

En urbo Szeged okazos

la 44a Landa Fervoja Esperantista Amika Renkontiĝo
(29. 06. 012 - 01. 07. 2012)

kiu per riĉa kulturprogramo atendas la interesantojn.

S-ino Adri Pásztor



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>